

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Jarkolekto 2



1971

Nürnberg

N-ro 1

# ENHAVO

O Sciigoj	Paĝo
I Pri la enhavo . . . . .	3
II Propono de la redaktoro . . . . .	3
III ILEI-aferoj . . . . .	3
<b>A Ĝeneralaj artikoloj</b>	
La problemo pri perfektigo de la instruado kaj plialtigo de ĝia efektivigo en la Popola Respubliko Bulgario . . . . .	4
La loko de biologio en naturscienca sistemo . . . . .	6
<b>B Fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj</b>	
La lerneja instruado de la Internacia Lingvo . . . . .	8
La vulpo kaj la vinberoj . . . . .	20
<b>C Informoj el la pedagogia vivo</b>	
Progresiva paŝo en nia movada historio . . . . .	21
Dua grava paŝo en Eŭropo al realiĝo de Esperanto . . . . .	24
Unua Internacia Domo de ILEI en Bulgario? . . . . .	24
Pri internacia infangazeto . . . . .	25
Pri Internacia Legolibro . . . . .	25
<b>Ĉ Forumo</b>	
Enketo ĉe ĝeinstruistoj de elementaj lernejoj . . . . .	26
La rezulto de fremdlingva instruado . . . . .	26
El leteroj . . . . .	27
<b>D Dokumentado</b>	
Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj de Pollando	
Instruprogramo de Esperanto . . . . .	27

## I. Pri la enhavo

La eldonisto kaj la redaktoro de IPR interkonsentis aperigi en du sekvoj „La lerneja instruado de la Internacia Lingvo“ de profesoro d-ro I. Szerdahelyi. Apud „metodiko de la esperanto instruado“ de R. Rákuša ĝi estas nun la dua verko pritraktanta la instruadon de Esperanto.

Pritraktante ne nur la metodikajn aspektojn de la lingva instruado, li ankaŭ eksplikas la psikologian rezonadon kaj liaj konkludoj rezultigas praktikajn vojojn de la instruado. Konsiderante, ke la sukceso de la instruado dependas de sia kvalito kaj sciante, ke la plimulto de la Esperanto-instruistoj ne spertis la klerigon por fremdlingva instruado, mi emfaze instigas zorgeme studi la verkon.

Rilate la klarigitan facilecon de Esperanto restas la fakto, ke ĝi estas lingvo nur instruebla laŭ certaj didaktikaj leĝoj, samgrade kiel aliaj lingvoj. Tiel vidite, Esperanto kiel studobjekto, havas tute alian karakteron ol la aliaj (matematiko, historio, ktp.), ĉar la instruado de iu ajn lingvo signifas plenan transformadon de nacilingva al fremdlingva pensmaniero.

Mi deziras al la verketo tiun atenton, kiun ĝi efektive meritas. Dankon al la aŭtoro pro lia bonega kaj utila laboro.

## II. Propono de la redaktoro

Konsiderante diversajn bonintencajn sugestojn pli intensigi la enhavon de IPR, mi petas la konstruktivan kulaboron de ĉiuj. Anstataŭ prezenti kaj vicigi artikolojn konsistantajn el diversaj temoj, ni preferu ĉefan temon, kiu pritraktu iun sekcion el la pedagogio kaj instruado.

Mi proponas jenajn ĉeftemojn:

- IPR 3/1971 Problemoj de la antaŭlerneja edukado
- IPR 1/1972 Edukado kaj instruado en la elementaj lernejoj (1 ĝis 4aj klasoj)
- IPR 2/1972 Edukado kaj instruado en la sekundarŝtupo I (5 ĝis 10aj klasoj)
- IPR 3/1972 Edukado kaj instruado en la sekundarŝtupo II (11 ĝis 12 (13)aj klasoj)
- IPR 1/1973 La taskoj de la lernejo en la socio
- IPR 2/1973 Demandoj pri la instruista klerigado
- IPR 3/1973 Taskoj de la politika edukado en la lernejoj

La artikoloj skribotaj aŭ tradukotaj respogulu la nunan situacion kaj intencojn en la diversaj landoj. Insiste mi petas la estrarojn de la landaj sekcioj de ILEI respondece disponigi al mi ĝustatempe la artikolojn. Por IPR 3/1971 nepre limdato estas la **1-a de decembro 1971**.

## III. ILEI - aferoj

### Konferenco de ILEI kaj ILEI-kunvenoj en Londono

Dum la 56-a UEA kongreso en Londono okazis por la ILEI-anoj la subaj aranĝoj:

**Mardon, la 3-an de aŭgusto**, de la 9.00 h ĝis la 15.30 h okazis la konferenco de ILEI en la Centra Oficejo de la sindikato de instruistoj (National Union of Teachers — Hamilton House — Mabledon Place).

Ĉiuj sekciestroj kaj ILEI-anoj estis invititaj partopreni la laborojn de la konferenco (partoprenis 22 geinstruistoj).

Tagordo kaj rezultoj de la konferenco (la interkrampitaj frazoj signifas la rezultaton de la diskutado):

#### 1. Decidoj de la Maribora Konferenco — julio 1970.

(La konferenco en Londono detale pritraktis kaj rediskutis la decidojn de la Maribora Konferenco kaj promesis pli intense plenumi la laborplanon.)

2. Organizo de Internacia Pedagogia Kongreso de ILEI en 1972  
(Plenumante la decidon de la estraro de ILEI, aranĝi 1972 ILEI-kongreson en Ruslando, aŭ en Leningrado aŭ en Vilno, la ĝenerala sekretario skribis al la tieaj Esperanto-grupoj, petante informon pri aranĝebleco.  
En la kazo de neebleco okazos la kongreso en Budapeŝto ekde la 18-a ĝis la 24-a de julio. Ĝi koincidus kun la samtempa Hungara Festivalo kaj donus al nia kongreso la kulturalan kadron.)
3. Disvastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj  
(La raportoj montris la pliiĝon de la lernejoj, en kiuj estas instruata Esperanto. Elstara estas la nun komenciĝanta lerneja eksperimento en Aŭstrio, Hungario, Italio, Bulgario kaj Jugoslavio. Krome la konferenco varme salutis la strebadon de la ILEI-sekcioj en Belgio, Nederlando kaj FRG aranĝi similan eksperimenton.)
4. Organizado, informado kaj dokumentado  
(Aparte kaj intense okupiĝas pri tiu ĉi tasko s-ro G. Caraffa, Italio, Varese, Via Sacco 14. La landaj sekcioj turnu sin rekte al li.)
5. Infangazeto kaj literaturo  
(Vidu la informan parton de tiu ĉi revuo.)
6. Feriaj centroj  
(Pri la afero nun speciale okupas sin la prezidanto de ILEI, Raif Markarian; pri la infankongreseto okazinta en Britujo kaj siaj spertoj li raportos en IPR.)
7. Internacia Pedagogia Revuo  
(La konferenco konfirmis sian volon daŭrigi IPR-n. La brita sekcio ekde 1972 devige abonigos siajn membrojn al IPR.)
8. Pedagogia Vortaro  
(Ĝis nun ne estas ia rezultato. La estraro konsideras komisiin d-ron Szerdahelyi kune kun liaj studentoj ellabori la fakan vortaron. La nuna komisiono estas petata kontakti kun li.)

**Merkredon, la 4-an de aŭgusto**, de la 16.00 h ĝis la 17.30 h okazis la komitata kunveno. La komitatanoj aprobis la raporton de la sekretario kaj la financon raporton de la kasistino. Tamen la komitatanoj postulis detalan buĝeton por la venonta jaro. Ĉeestis la kunvenon la eldonisto de IPR kaj aŭdinte la opinion de la komitatanoj nepre abonigi ĉiujn instruistojn de ILEI, li decidis daŭrigi la eldonadon.

**Vendredon, la 6-an de aŭgusto**, la estraro de ILEI estis akceptita de la sindikato „National Union of Teachers“. La viglaj interŝanĝoj de opinioj pri la signifo de la Internacia Lingvo Esperanto konvinkis la estraranojn, ke la renkontiĝo estis tre utila.

#### **Prof. d-ro Szerdahelyi prezidanto de la Internacia Pedagogia Ekzamenkomisiono**

En aparta kunsido la estraro de ILEI komisiis al d-ro Szerdahelyi esti prezidanto de la ekzamenkomisiono.

#### A Ĝeneralaj artikoloj

## **La problemo pri perfektigo de la instruado kaj plialtigo de ĝia efektiveco en la Popola Respubliko Bulgario**

**Petr Petrov, Bulgario**

1969 okazis plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio, dediĉita al problemoj pri rekonstruo kaj plua disvolviĝo de la klerigado. Ĝi markis vastan programon por plialtigo de la kleriga afero en nia lando. La komitato prilaboris la plej gravajn direktivojn por reformo de nia eduka sistemo. Unu el la gravegaj taskoj stariĝitaj de tiu ĉi organo estas la transiro en ne plu malproksima tempo al deviga mezgrada instruado per kreado de tute nova tipo de unueca mezgrada politeknika lernejo. Ĝin trapasu la tuta juna generacio.

Kiu hodiaŭ volas modernigi la enhavon de la klerigado, devas decide plibonigi la sistemon kaj ties strukturon. Nur tiel ekzistas konformeco kun la novaj teorioj, havantaj decidan signifon por la studotaj sciencoj, kiuj rilatas al tiuj konoj, kiuj estos precipe gravaj por la vivo. Kompreneble estas tio longdaŭra proceso. Ĝi baziĝas pro la strukturaj ŝanĝoj sur amasaj multflankaj eksperimentoj, pri tio ni konsideras ĉiujn tutmondajn spertojn.

La speciala demando estas kiamaniere oni povas reformi la strukturon kaj organizadon de la instruproceso, por krei plej favorajn kondiĉojn de la instruado por plua disvolviĝo kaj perfektigado. Konekse kun tio esence ankaŭ ŝanĝiĝos la ĝisnunaj tradiciaj klasoj kaj lecionoj. Ni ne subtakŝas ĝian valoron kaj sencon, sed ni nur ne plu vidas en tiu ĉi organiza formo la unu solan vojon rilate al alproprigado de konoj far la lernantojn. Necesas nun novaj trajtoj, kiuj pliriĉigos la klaslecionan sistemon. Pli da spaco devos esti donita por la individua evoluo, t. e. la lernantoj devas esti metitaj sub la samaj kondiĉoj por sekvi siajn personajn inklinojn kaj interesojn. Laŭ du direktoj ni klopodas solvi la problemon: a) trovi novajn, aktualajn, pli efikajn formojn de la instruaj rimedoj kaj b) plibonigi kaj pliperfektigi la ĝisnunajn metodojn kaj instrurimedojn.

Sekvante la celon realigi pli favoran kontinuecon inter la mezgrada kaj supera klerigado kunlige kun la pli grandaj ebloj por la lernantoj en la lastaj klasoj de mezgradaj lernejoj, ni nun utiligas formojn kaj metodojn, kiuj estas parencaj al la metodiko de la instruado en la superaj lernejoj, t. e. la lekcio, seminarioj okupoj, legado, referatoj pri apartaj problemoj, diskutoj k. a. Speciale konvenaj estas tiuj ĉi formoj kaj metodoj ĉe la instruado de la literaturo, historio, biologio, geografio, fiziko, ĥemio ktp., kiuj ebligas pridiskutojn, analizojn de fenomenoj, faktoj kaj eventoj. Tiel la lernanto kapablas fari valorajn deduktojn por la praktiko kaj gajnos sciencajn mondkoncepton.

Multaj instruistoj montras viglan interesiĝon pri eksperimenta kontrolo de iuj novaj organizaj formoj de instruado. Al ĝi ekzemple apartenas la tiel nomata ĝeneralklasa formo. En tiu ĉi klasa tipo ni kunigas la frontalajn, grupajn kaj individuajn laborformojn, kunigitajn konsiste kun lernantoj el du, tri aŭ pli da samgradaj klasoj.

La leciono restas la baza formo de la instruado en niaj lernejoj. La sukcesa solvo de la taskoj de ni prezentitaj al la lernejoj, altgrade dependas de la konkreta enhavo de la lecionoj kaj iliaj organizado, metodoj, manieroj, utiligataj de la instruistoj en la proceso de la instruado. Do, la plua perfektigado estas grava tasko de la pedagogia teorio kaj praktiko. Tiun ĉi perfektigon oni faras en diversaj direktoj: plialtigo de la scienteoria nivelo de la instruado kaj plifortigo de la eduka rolo de la leciono, realigo de pli intima ligo kun la vivo, kun la produktiveco, kun la praktiko, disvolviĝo de diversaj aktivecoj memstareco kaj konscio de la lernantoj dum la lecionoj, individuigado kaj diferencigado ĉe la proceso de la alproprigo de konoj, vasta aplikado de nuntempaj teknikaj rimedoj, racia utiligado de la studtempo ktp. Konforme al tiuj ĉi direktoj ni fiksas ankaŭ novan manieron por kontroli kaj taksu la konojn, scipovojn kaj kutimojn de la lernantoj. Specialan atenton ni konsideras rilate iliajn produktivemajn agadojn, ne nur kontrolante ilian kapablon, reprodukti la ricevitajn konojn.

Dum la lastaj jaroj la instruistoj ĉiam pli komprenas la apartan signifon de instruekskursoj, komprenas la praktikajn okupojn en la konferencoj, la reciprokajn konsultadojn, la diversajn fakultativajn okupojn, do — koncize — la vastan skalon de ĉiuj kaj tipaj kaj variaj elementoj, kiuj hodiaŭ determinas psikologie, didaktike, metode kaj sociologie la modernan pedagogian sistemon. Ili strebas utiligi ilin ĉiam pli larĝe en la lerneja praktiko, sed ankaŭ stude ili rezonas la teoriajn rilatojn, celante konstati la leĝecon, kiu diferencigas la ceterajn formojn en la organizado de lecionoj, por tiel montri klare ilian lokon kaj rolon en la instruproceso.

La racia organizado de la lecionoj kaj aliaj formoj de instruado permesas konsiderinde plifaciligi la hejman laboron de la lernantoj, malpligrandigi ilian trookupatecon, disponigi al ili pli grandan eblecon por utiligi ilian libertempon kaj tiel servi al iliaj individuaj spiritaĵoj kaj fizikaj interesoĵoj kaj bezonoj.

## La loko de biologio en naturscienca sistemo

R. Aleksic, Jugoslavio

Grandaj paŝoj de la sciencoj en la lastaj jardekoj estas tre ege evidentaj. La progreso de la vivnivelo de la homo estas tia dank' al evoluo de la natursciencoj, fiziko, diversaj teknologioj kaj teknikaj sciencoj. Apartan lokon okupis dum la lastaj jaroj astronautiko, kibernetiko akompanataj de diversaj teknikaj sciencoj apenaŭ ĝermantaj.

Biologio kaj ĥemio konsiderataj de la scienca vidpunkto ankaŭ estas natursciencaj sistemoj. La nocio de biologio devas esti subkomprenata kiel sciencaro studenta la estaĵojn: mikrobojn, plantojn kaj animalojn, ampleksante morfologion, sistematikon, genetikon, paleobotanikon, ekologion, fiziologion, bioĥemion, molakulbiologion, medicinon, veterinon kaj agrikulturdisciplinojn. Analoge la nocio de ĥemio kiel sistemo de natursciencoj ampleksas neorganikan, organikan ĥemion, fizikan ĥemion kaj la vicon de aliaj ĥemiaj disciplinoj.

La substanco (materio) estas studata de ambaŭ ĉi sistemoj. Ankaŭ ĝian ŝanĝiĝon kaj movon studas biologio kaj ĥemio. La ĥemio studas la enhavon, movon kaj ŝanĝiĝon de la materio en la naturo ĝenerale, kaj biologio movon kaj ŝanĝiĝon de materio en la kondiĉoj de ĝia plej kompleksa formo — en ĝia natura ĉirkaŭaĵo (medio). Jam unika tiu fakto montriĝas ke inter biologio kaj ĥemio devas esti proksimaj, reciprokaj rilatoj kaj dependeco. Ankaŭ tion montras ilia historia evoluo. Sed ŝparante la spacon ni ne parolos plu pri tio, krom mencio de kelkaj ekzemploj neprav por montri komparan enhavon kaj reciprokan influon de tiuj ĉi du natursciencaj sistemoj, dependantaj unu de alia.

Jam estas dirite ke materio estas studata de ambaŭ tiuj ĉi sistemoj, komence evoluintaj de la 15a jarcento, en tiu epoko de pligrandiĝo de la loĝantaro de la mondo, dum aperado de novaj produktaj rilatoj, potencoj kaj faro unue en Eŭropo.

La evoluo de la ĥemio komenciĝis tiam dank' al bezono je novaj materialoj, nova teknologio de rafinado, de materialoj; dume biologio naskiĝis el la sino de medicino, poste el la sino de la agrikulturo kaj zootekniko. En la unua periodo ĥemio estis ligita al la medicino, esplorante la enhavon de la homokorpaj likvaĵoj kaj preparante la kuracilojn, sed interpretante propramaniere vivprocezon kaj malsanojn. Tiel aperis aparta ĥemia branĉo — la jatroĥemio, kiu simpligis naive kaj mekanike vivprocezojn, konciderante ilin same kiel simplajn ĥemiajn procezojn kaj opiniante ilin organisma „ĥemia maŝino“, sed stimolante la esploron de la enhavo de la homa korpo, ĝiajn sukcojn kaj fine ĥemiajn procezojn en la organismo, kontribuante al la evoluo de ĥemio, medicino kaj fine de la biologio.

Multaj signifoplenaj ĥemiaj malkovroj dum la 17a kaj 18a jarcentoj estis gravegaj por la evoluo de la biologio, ekz. la malkovro de karbodioksido kaj oksigeno kies signifo por vivprocesoj estis rimarkebla. La studado de la oksidacio instigis Lavoiser konsideri la spiradon kaj nomi ĝin „trankvila oksidacio“, t. e. dum oni konsumas oksigenon, oni produktas karbodioksidon kaj varmenergion. Kompara esplorado de kvanto da varmenergio liberigita dum la oksidacio kaj da karbono kaj de la restado de malgranda animalo en la kalorimetro montris en ambaŭ eksperimentoj — kaj okaze de liberigo — saman kvanton da varmenergio, kiu estis konsumita de la sama kvanto de karbodioksido.

Same, dum la komenco de la 19a jarcento oni izolis el animalaj organismoj sufiĉan nombron da ĥemiaj kunigoj. Surbaze de tiuj eksperimentoj oni fondis novan ĥemidisciplinon, t. n. ĥemio de animaloj, kiujn oni poste transformis en ĥemion de karbonaj kunigoj aŭ en organikan ĥemion. Tiam oni fine liberigis sin de unu granda mensdevojiĝo: ke por sinteze krei organikajn kunigojn oni bezonas „vivpotencon“. Estis la merito de Wöler, kiu sukcesis per laboratoria sintezo fabriki ureon: poste sekvis sintezo de graso, de sukero, de aminoacidaĵoj kaj fine de peptidoj. De granda signifo estis la malkovro kaj formulado de leĝo pri konservado de materio kaj energio kaj la konstato, ke tiu ĉi leĝo ankaŭ validas por materio konsistanta en organismo, per kiu estis definitive pruvita materialeco de vivestaĵo.

Sukcesega evoluo de biologio kaj ĥemio dum la 19a jarcento kaŭzis interalie malkovron de grandega fakmaterialo pri la enhavo de diversaj organismoj kaj pri ĥemiaj procezoj en la organismo kaŭzante la vicon de novaj fakdisciplinoj en la limo inter biologio kaj

ĥemio: ekzemple, fiziologia ĥemio (bioĥemio), biologio de molekuloj, genetiko, imunoĥemio kaj biofiziko.

Jetinte retrospektivan rigardon al la evoluo de biologio kaj ĥemio ni facile povas konkludi, ke biologio kaj ĥemio grandskale influadis unu la alian, la evoluo de unu kaŭzis progreson de alia. Unue ni analizos la influon de biologio sur la progreson de la ĥemio. Per sia riĉeco de la plej diversaj ĥemiaj konsistoj la vivestajoj prezentis neelĉerpitan kvanton de la ideoj por ĥemiistoj, kiuj izolis kaj trastudis tiujn multnombrajn konsistojn de plantoj, animaloj kaj mikroboj. Kombreneble estis izolataj tiuj konsistoj, kiuj aperas en pli grandaj kvantoj (koncentrecoj) kaj tuj estis ekkoneblaj. Tiamaniere oni malkovris multajn kuracilojn, venenojn, vitaminojn, hormonojn kaj aliajn.

La esploro de la konsisto kaj strukturo de organikaj kunigoj de plantoj kaj animaloj malkovris al ĥemiistoj la konsiston de pli ampleksa strukturo ol de aliaj devenanta el anorganika naturo. La ekzamenado de tiuj ĉi organikaj konsistoj pliriĉigis la teorion de la ĥemiistoj pri la sintezo de organikaj kunigoj ricevitaj el la naturo kaj tielsence kontribuis al la evoluo de la sinteza ĥemio. Hodiaŭ eĉ oni ne povas imagi ĝian progreson sen la helpo de la biologiaj kuracistoj kaj aliaj esploristoj de biologiaj ecoj pri la sintezaj produktoj, kiuj montris la rekonon de la modifiko de la sintezo. Precipe tio okazis kun dormiloj (dormrimedoj), kontraŭlepraĵ kuraciloj, sulfonamidaĵo, pesticidoj k. a.

La faktoj montrantaj malgrandan kvanton (koncentrecon) de multaj konsistoj de histoj klarigas la aferon de ofta miksaĵo de tre proksimaj kunigoj, helpis stimulan analitikan ĥemion en la invento de novaj preparativaj metodoj. La bazon por kromatografio kreis la botanikisto Cvet, kiu kiel unua aplikis ĝin por ekstrakti A kaj B klorofilojn, karotinojn kaj aliajn plantpigmentojn. Ankaŭ multaj aliaj preparativaj metodoj, same kiel kromatografio, filtrapapera kromatografio, gelkromatografio, gelfiltrado, diversaj modifiko de elektroforezo kaj ultracentrifugado unue estis aplikeblaj sur biologia materialo. Biologio influadis pluan progreson de ĥemiaj branĉoj. Graham, esplorante la konduton de gelatensolvado, starigis la bazon de la koloida ĥemio. Studado de la strukturo de nukleacidaĵoj kaj proteinoj pliriĉigis la scion de ĥemio pri la tipoj de ĥemiaj valentoj. Esplorado kaj ekzamenado de diversaj naturaj polimeroj-celulozo, naturrezinoj, kaŭĉuko, silko ebligis al la ĥemiistoj ekkoni la leĝojn de polimerizado kaj plifaciligis sintezon de artgumo, artsilko, artrezinoj kaj plastikaj materialoj.

La evoluo de biologiaj sciencoj estas preskaŭ ligita al la evoluo de ĥemiaj sciencoj kaj aplikado de ĥemiaj metodoj. Sen la kono kaj apliko de ĥemiaj metodoj oni ne estus kapablaj esplori la ecojn kaj strukturon de la konsistoj de la organismo, studadi la metabolismon kaj interŝanĝon, la sintezon de diversaj multnombraj konsistoj de la organismo. De granda valoro estis la apliko de t. n. markitaj ĥemiaj kombinaĵoj per enmetitaj radiaktivaj izotopoj, aŭ stabilaj izotopoj de karboneo, de hidrogeno, de oksigeno, de nitrogeno, de sulfuro, de fosforo, de fero, ĉar ĝi efektive demonstris la brilplenan sukceson rilate la klarigadon de la procezoj de metaboloj en la materio kaj la movon de unuopaj konsistoj en la organismoj. Multnombraj metodoj ebligis izoli opajn organerojn el la ĉelo: nukleon, mitohondriojn, mikrozomojn, ĉeloplasmon kaj ĉelmembranon. Ili ebligis ekkonon pri konsisto de ĉiuj partoj de la ĉelo kaj ilian rolon en la vivprocezoj. Dank' al tiu ĉi fakto oni nun scias la rolon de la ĉel-membrano, la transportmanieron de la unuopaj konsistoj tra ĝi. Ankaŭ oni scias la rolon de la mitohondrioj en la procezoj de oksidacio kaj ilia liberiĝo kaj akumulo de varmenergio en la ĉelo, kio ne estis konata antaŭ dudek jaroj.

Unu el sendube la plej grandaj malkovroj de nia epoko estas la klarigado de la signifo de DNA (mallong. dezoksinukleina acidaĵo) el la nukleo kiel materio portanta heredajecojn, la t. n. genojn. Oni ekkonis la mekanismon de la transporto de genmesaĝoj, de la informoj al ribozoma sistemo en la ĉelplasma partoprenantaj en la sintezo de proteinoj surbaze de peraj RN-oj (mallong. ribonukleinaj acidaĵoj). Ne malpli grandan signifon posedis la sciigo pri la mekanismo prizorgata de speciala ordo de la aminacidaĵoj dum la sintezo de proteinmolekuloj kaj same pri bioĥemiaj reguloj en ties rolo de montrado kaj kaŝado de fenotipaj heredajecoj (eksteraj ecoj de individuo, tuj rimarkeblaj — kontraŭe al genotipo). Memorendaj estas ankaŭ la veraj indikoj pri la ŝanĝo de la RNA-strukturo en la cerboĉeloj dum la procezo de rememoro.

Analizo kaj pliklarigo de proteinaj konsistoj ebligis pli bonan komprenon de jam longtempe konataj ecoj de biologiaj specifikoj. Imunoĥemio trovis similecon kaj diferencon

inter la unuopaj animalspecoj, por pruvi filogenetikan devenon kaj parencon inter la unuopaj sistematikaj animalkategorioj. Krom morfologiaj kaj funkciaj ecoj ni hodiaŭ disponas per imunohemiaj indikoj pri specificeco kaj identeco de la unuopaj specoj.

La praktika valoro de ĥemio por la biologio estas evidenta. Pri la graveco de la ĥemio por la medicino ni jam parolis. Tiam ni menciis, ke oni ne povas imagi la modernan agrikulturon, hortikulturon, forstekonomion kaj zooteknikon sen aplikado de atingajoj de la moderna ĥemio: t. e. ekzamenado de la grundo, la ecoj de la grundo, la fabrikado de mineralaj sterkoj, preparado de novaj nutraĵoj kaj produktado de pesticidoj.

Fine ni ne lasu la gravan faktoron por biologiaj sciencoj. Pere de forfalajoj en fabrikado de diversaj sintezitaj materialoj kaj produktoj, de venenaj elvaporaĵoj kaj fumo, de nekontrolita aplikado de pesticidoj la ĥemio en zorgoplena grado kondamnas la biosferon, kio kaŭzas danĝeron por vivestajoj eĉ por la homoj. Jam estas direktitaj multaj peticioj kaj admonoj de fiŝbredistoj kaj naturamikoj al biologoj, ĥemiistoj kaj teknologoj por gardi la biosferon. Sola rimedo estus pli proksima kunlaboro de ĥemiistoj kaj biologoj ĉe la procedo de teknologia evoluo de monda produktado kaj esploro. Do, estas devo de ĉiu sciencisto kunlabori, ekzameni la biosferon en sia scienca regiono kaj malebligi ĝian pluan kondamnadon. Nur tia maniero savos la vivon de propra memmortigo pere diversaj novaj ĥemiaj kaj biologiaj malkovroj.

El „Moderna biologio“ (kroata lingvo) traduktita en Esperanton.

B Fakmetodaj kaj didaktikaj traktaĵoj

## La lerneja instruado de la Internacia Lingvo

Enkonduko en instrumentodon

de

Prof. d-ro István Szerdahelyi, fakestro de „Esperanto lingvo kaj literaturo“  
en la universitato Lóránd EÖTVÖS, Budapest

### ENKONDUKO

§ 1 **Metodo** estas sistema kombinado de rimedoj kaj procedoj por atingi difinitan celon. La metodo rilatas ĉiam al konkreta situacio kaj dependas de konkretaj faktoroj. Absoluta, ĉiam kaj ĉie valida metodo ne ekzistas. Ekzistas nur pli aŭ malpli ĝenerale validaj principoj, rimedoj kaj procedoj.

La instrumentodon de iu studobjekto difinas:

- a) la celo de ĝia instruado — KIAL?
- b) la karaktero de la studobjekto kaj ĝia materialo — KION?
- c) la formo de la instruado kaj la konsisto de la lernantaro — KIUJN?

### § 2 La celo de Esperanto-instruado

Dum la instruado de Esperanto ni klopodas atingi **praktikan kaj edukan celojn**.


La **praktika celo** de Esperanto-instruado estas: elformi en la lernantoj la kapablon paroli la lingvon, t. e. produktive uzi ĝin por transdoni komunikajojn kaj skribe kaj buŝe.

La **eduka celo** de Esperanto-instruado estas: elformi en la instruatoj dum la instruprocezo tiujn karaktertraĵojn, kiuj karakterizas la esperantismon kiel koncepton.

Esperanto kiel studobjekto devas kontribui al tiuj ĝeneralaj popolklerigaj celadoj en kies kadroj ĝi okazas. Krome, laŭ siaj specifaj ecoj, Esperanto povas akcentite kontribui al la efektivigo de kelkaj partikularaj celoj. Ekzemple: estante lingvo internacia ĝi emfaze taŭgas por la edukado al internaciismo, al internacia interkompreniĝado. Estante neŭtrala ĝia instruado ebligas la edukadon al la reciproka estimo de nacioj, taksu egalaj ĉiujn naciojn. Laŭ sia esenco estante pacama, Esperanto perfekte taŭgas eduki al pacamo, konduki al la paca kunekzistado de diversaj nacioj.



§ 3 Laŭkaraktere Esperanto estas lingvo, sekve la principoj de ĝia instruado kongruas kun la ĝeneralaj principoj de la lingvo-instruado. Elirante el la plej ĝeneralaj, la principoj ĉiam konkretiĝas laŭ la suba skemo:



La sistemo de instrumentodaj principoj en nia kazo sekvas la vicon: lingvo — fremda lingvo — vivanta fremda lingvo — internacia lingvo, fremda, vivanta.

§ 4 La **formo de la instruado** povas esti tre diversa. La plej grava estas la **lerneja instruado**. La enkonduko de Esperanto en lernejojn dekomence estis unu el la plej gravaj taskoj de la movado. Jam dum la unua UK en 1905 EDMOND PRIVAT proponis ĝin, kaj la propono eniris en la tagordon kiel la 4-a punkto. Ĉis la unua mondmilito oni enkondukis la instruadon de Esperanto sporade en la plej diverslandajn lernejojn. Post la mondmilito, en 1922, la 18-an de aprilo, la Societo de Nacioj kunvokis la reprezentantojn el ĉiuj landoj-membroj por diskuti la problemon: „La lerneja instruado de Esperanto“. Partoprenis pli ol 100 pedagogoj el 28 ŝtatoj — inter ili 16 oficialaj reprezentantoj de la registaroj. La konferenco sendis siajn favorajn proponojn al la Estraro de Societo de Nacioj. Post longaj diskutoj venkis la franca starpunkto, kiu kontraŭis la enkondukon de Esperanto en lernejojn (18 voĉoj kontraŭ 8), kaj fine oni decidis transdoni la aferon al la Komisiono pri Intelektala Kunlaborado. Finfine la Komisiono ne proponis la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, sed konsilis al la Societo de Nacioj atente sekvi la evoluadon de Esperanto, „kies uzado efike povus helpi al efektiviĝo de la morala unueco de la homaro, se ĝi ĝenerale disvastiĝus“. 30 jarojn poste preskaŭ samenhavan rezolucion portis la Unesko-konferenco en Montevideo: „La ĝenerala Konferenco... / IV. 1. 4. 4223 / notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia pretenco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la ĝeneralan direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo, ...“

Nuntempe en la plejparto de la ŝtatoj Esperanto estas instruebla en lernejoj, precipe kiel nedevega, kromprograma, libervole elektita studobjekto. Laŭ neprecizaj statistikoj la evoluado de lerneja instruado aspektas jene:

1950/51	— 15 ŝtatoj	— 114 lernejoj
1955/56	— 22 „	— 142 „
1959/60	— 27 „	— 356 „
1961/62	— 27 „	— 471 „
1962/63	— 32 „	— 563 „
1968/69	— 31 „	— 691 „

En niaj tempoj la enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj ĝia oficialigo formas la ĉefan taskon de UEA kaj same de ILEI. En sia statuto ILEI formulas: „unuigi ĉiujn instruistajn Esperanto-organizaĵojn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn, kaj organizi reciprokajn interŝanĝojn de spertoj de la monda E-instruistaro rilate al plibonigo kaj modernigo de la Esperanto-instruado.“

Grandan antaŭenpuŝon povas doni al la afero la konkludo de la III-a Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn (Maribor, 27 — 29a de marto, 1970) kies duan paragrafon ni citas laŭvorte: „... la Konferenco instigas al la daŭrigo de instruado en ĝisnunaj formoj kaj en la celo de plua evoluigo de Esperanto-instruado proponas al la kompetentaj lernejoj instancoj de la ŝtatoj Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj

Jugoslavio enkonduki eksperimente devigan instruadon de Esperanto en difinita nombro da lernejoj. Estus konsilinde, ke la instruado de Esperanto komenciĝu post 4 jaroj de la elementa lerneja studado, kaj ke ĝi daŭru minimume tri jarojn.“


La Konferenco komisiis la fakan gvidadon de la eksperimento al la Esperanto-fako de la Scienca Universitato Lóránt Eötvös, Budapest.

§ 5 La formon de la instruado parte difinas la **konsisto de la lernantaro**: en lernejoj oni instruas ĝenerale geknabojn, gejunulojn, en vesperaj kursoj plenkreskulojn. La faktoroj, kiuj pleje influas la metodikon estas: la aĝo, la gepatra lingvo kaj la ĝeneralaj kaj lingvaj antaŭkonoj. Dum la organizado de studmaterialo kaj ĝia instruado oni nepre devas priatenti la aĝon, kiu siavice difinas la kapablojn kaj la interesrondon de la gelernantoj. La plej grava faktoro estas la gepatra lingvo, kiu ĉiam ĉeestas, ĉu konscie, ĉu subkonscie dum la tuta instruprocezo. La fakto, ke la alproprigon de Esperanto antaŭas jam la regado de iu lingvo, parte helpas, parte malhelpas ĝian instruadon. La fakto de interĝenado de lingvoj nomiĝas **interferenco**. La interferenco kaŭzas helpaĵojn (**pozitivajn transferojn**) kaj malhelpaĵojn (**negativajn transferojn**). Estas la tasko de metodologio esplori la interferencan sistemon, konstati la pozitivajn kaj negativajn transferojn kaj konstrui la **metodologian tipologion** de la gepatra kaj instruata fremda lingvoj. La plej granda didaktika valoro de Esperanto-instruado, kiel unua fremda lingvo estas, ke ĝia alproprigo ĝisminimume reduktas la interferencan inter la gepatra kaj la dua fremda lingvo, kreante riĉan sistemon de pozitivaj transferoj. (Precipe grava estas ĝia transfera rolo inter la ugro-finna hungara lingvo kaj iu hindo-eŭropa-lingvo.)

§ 6 Kiel dirite en la § 2 — la praktika celado de Esperanto-instruado estas la alproprigo de la parolo. La metodiko strikte diferencigas la **lingvon de la parolo**. La lingvo estas la materialo de la instruado, ĝi estas sistemo de konoj. La lingvon, ĝian fonetikon, gramatikon kaj leksikon oni povas lerni, sed la nura kono de la lingvo ne signifas kapablon uzi ĝin praktike. La parolo estas sistemo de aŭtomataj kapabloj: paroli, kompreni, skribi, legi. La kapabloj elformiĝas per daŭra, persista, konsekvenca ekzercado. La konoj estas rimedkarakteraj: ili plifaciligas la elformadon kaj la firmigon de la kapabloj.

#### LA STUDMATERIALO

§ 7 La lingvo estas ampleksega, komplika kaj tre kompleksa fenomeno. „Ataki“ ĝin sur ĉiuj frontoj samtempe neblas. La tasko de metodologio estas „segmenti“ la materialon, t.e. detranĉi el ĝi partojn (mikroorganismojn), kiuj limigite kapablas memstare funkcii. La principon — sed ne la proporciojn! — prezentas la suba skemo:



La lingvomaterialo, segmentita en la celo de la instruado, nomiĝas „**minimumo**“: leksika-, gramatika- kaj fonetika-minimumo. La minimumoj denombrias la materialon, ekz. la vortelementojn, la gramatikaĵojn. Ke iu elemento apartenas aŭ ne al la minimumo estas konstatenda laŭ certaj principoj:

- a) **la ofteco** — en la minimumon eniras la plej oftaj elementoj, ĉar laŭ didaktika vidpunkto ju pli alta estas la frekvenco de iu elemento, des pli alta estas ĝia uzvaloro;
- b) **la disponebleco** — estas elementoj, kies frekvencia koeficiento estas malalta, tamen el aliaj vidpunktoj ili devas eniri en la minimumon. Ekzemple tiaj vortoj, kiel „kreto, tabulo, ŝuo ...“ estas maloftaj en la ĉiutaga parolado, tamen gravaj en la lingvo-instruado;
- c) **la tematika sistemeco** — gravas ĉefe ĉe fermitaj tematikaj grupoj, ekz. la 7 tagoj, la 4 sezonoj, la 10 bazaj numeraloj, ktp. Laŭ tiu principo la eroj de tiuj sistemo devas eniri en la minimumon sendepende de ilia frekvenco;
- d) **la valento** — t. e. la kombiniveco de elementoj. Ju pli kombiniva estas iu elemento, des pli alta estas ĝia didaktika valoro. Ekzemple la sufikso -ing- havas malaltan valent-koeficienton, ĉar ĝi kombiniĝas nur kun limigita nombro da aliaj elementoj;
- e) **la internacieco** — pli precize: la simileco al la adekvata elemento en la gepatra lingvo aŭ en alia lingvo, konata jam fare de la lernantoj. Tiu lasta principo efikas ĉefe en la unua periodo.

§ 8 Post la segmentado de la lingva materialo sekvas **la organizado** de la segmentita materialo, t. e. la dozado laŭ diversaj instruetaĵoj kaj la metodika ellaborado. La dozado okazas en la formo de **instruprojektoj**, la metodike ellaborita materialo konkretiĝas en **la lernolibro**.

La metodika ellaborado okazas laŭ certaj instrumentodaj konceptoj: la lernolibro entenas ne nur simplan inventaron de la instruenda materialo, sed ĝi jam sugestas ankaŭ la metodon, laŭ kiu tiu materialo estu instruata.

Sumigante la materialon de la 7a kaj 8a paragrafoj, ni povas ĝin prezenti skeme:

I-a etapo	II-a etapo		III-a etapo
leksika, gramatika kaj fonetika minimumoj	dozoj laŭ instruetaĵoj = instruprojektoj	didaktike ellaborita materialo = lernolibro	presentado + lernado + ekzercado + aplikado + kontrolo +
SEGMENTADO	ORGANIZADO		INSTRUADO

### INSTRUMENTODAJ KONCEPTOJ

§ 9 La unua lerneja metodo, kiu elformiĝis tiam, kiam oni komencis instrui la latinan lingvon en la eŭropaj lernejoj kaj poste, laŭ tiu modelo la aliajn, precipe la francan, nomiĝas **gramatika-traduka metodo**. En la instruado centran lokon okupas la lernolibro, komence iu libro, ekz. la Biblio, kies tekstojn oni legas kaj poste oni analizas ĝin gramatike kaj tradukas gepatrolingven ĝin. Tio estas la **analizo**. La inversa procedo, t. e. kiam unue oni lernas vortojn kaj gramatikajn regulojn kaj poste, surbaze de gramatikaj kaj leksikaj konoj oni kunmetas frazojn, nomiĝas **sintezo**. La ĉefa ekzercadformo estas la traduko, sekve la gepatra lingvo ĉiam ĉeestas dum la instruado.

§ 10 Je la fino de la XIX-a jarcento, kiam plivigliĝas la internacia trafiko, la vivo postulas jam la praktikan uzon de la fremdaj lingvoj. Ne plu sufiĉas la teoria kono de leksiko kaj gramatiko, sed oni postulas rapidajn rezultatojn. En 1880 aperas la libro de **François Gouin**: „L'art d'enseigner et d'étudier les langues“ (La arto instrui kaj lerni la lingvojn). La bazaj principoj estas:

1. gravas ne la vido sed la aŭdo; sekve oni devas paroli kaj paroligi. La parolo estas tempa fenomeno, kies elementoj sekvas unu post alia kaj ne spaca kun elementoj metitaj unu apud alia;
2. oni lernas iun fremdan lingvon por scipovi komuniki informaĵon, sekve la baza didaktika unuo estas ne la vorto sed la frazo. La parolata frazo devas ĉiam antaŭi la frazon legotan aŭ skribotan.

Laŭ tiuj principoj diserigas Gouin la lingvon je frazserioj (t.n. „Gouin-vicoj) konstruitaj laŭ strikta logika kaj kronologia sinsekvo. Tiamaniere li konstruas 50 000 frazojn grupigitajn laŭ 5 temoj: 1) la gepatra domo, 2) la socio, 3) la naturo, 4) la metioj, 5) la sciencoj. Ekzemplo de Gouin-vico (la lernanto agas kaj dume li diras, kion li faras):

„Mi iras al la pordo. Mi haltas ĉe la pordo. Mi staras antaŭ la pordo. Mi etendas la brakon. Mi tuŝas la klinkon de la pordo. La klinko estas en mia dekstra mano. Mi premas la klinkon. Mi malfermas la pordon. La pordo malfermiĝas . . . ktp.“

La Gouin-koncepto jam krute diferencas de la gramatika-traduka koncepto, kvankam Gouin en la komenca periodo uzas la gepatran lingvon por traduki kaj klarigi la gramatikajn fenomenojn.

§ 11 Du jarojn post la apero de la Gouin-verko, en 1882 la germana metodikisto Wilhelm Viëtor, sub la pseŭdonimo „Qousque tandem?“ publikigas sian faman verkon: „Der Sprachunterricht muß umkehren“, kiu poste fariĝis la bazo de la nova, t. n. „**rekta metodo**“. Tiu koncepto regas tutan periodon (la t.n. reformperiodon) kaj ĝis niaj tagoj havas fortan influon. La bazprincipoj de la rekta (senpera, natura) metodo estas:

- a) la forigo de la gepatra lingvo;
- b) la ekskludo de la gramatiko-instruado;
- c) la forigo de la lernolibroj.

La ekskluziva ekzercadformo estas la konversacioj, kiuj devas esti ĉiam aktualaj, viglaj kaj spritaj. Oni uzas ekzercojn de tradukado nek el- nek en gepatra lingvo.

Kvankam la rekta metodo havas multajn pozitivajn elementojn, tamen ĝia ekskluziva apliko ne eblas: instrui nekonatajn per nekonataĵo estus absurda postulo („ignotum per ignotius“).

§ 12 Ankaŭ la Esperanto-instruado trapasis ĉi tiujn evolufazojn. Novan epokon en la metodiko de Esperanto-instruado malfermis la hungaro **Andreo CSEH** (naskiĝis en 1895). Li ellaboris sian instruoprocedon en 1920. Poste, kune kun ges-roj ISBRUCKER li fondis en Arnheмо la Internacian Cseh-Instituton (poste Internacia Esperanto-Instituto). Tie oni okazigas kursojn por estontaj Cseh-instruistoj kaj eldonas revuon „La Praktiko“, organo de Universala Ligo, fondita en 1932.

La Cseh-metodo estas esence rekta-metodo, ĉar la karakteriza situacio, en kiu oni ĝin uzas (fremdlingvano instruas al fremdlingvano) en si mem malebligas la uzon de iu komuna lingvo. Oni ne uzas lernolibrojn, sed la gramatikon oni instruas, eĉ sufiĉe intense. Sed la instruado sian gramatiko estas enkadrigita en la studmaterialon, kaj oni instruas ĝin en Esperanto. (Tiu fenomeno estas tute speciala, kaj ĝi troviĝas en neniu alia instrumentoda koncepto.)

Laŭ la Cseh-metodo oni povas atingi bonegajn rezultojn facile, amuze kaj rapide. Sed ĝian ĝeneraligon malhelpas la manko de lernolibro kaj la manko de taŭgaj instruistoj. La metodo postulas de la instruistoj tiel altajn kvalitojn, kiujn postuli ĝenerale ne eblas. Tamen, kiel la plej alta grado de Esperanto-instruado restas ĉiam modelo por la Esperanto-instruistoj.

§ 13 La bazprincipoj de la Czeh-metodo estas (laŭ Enciklopedio de Esperanto, I-a volumo, p. 87):

1. neuzado de nacia lingvo, klarigado de novaj vortoj per la jam instruitaj;
2. neuzado de lernolibroj;
3. komuna ĥora respondado de la kursanoj;
4. aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lerneĵaj ekzemploj;

5. riĉa aplikado de humoro kaj ŝercoj;
6. instigado al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la regulojn de la lingvo, kaj ke ili mem konstruu gramatikan sistemon.

La devizo estas: „forte, kuraĝe kaj elegante“!

Andreo CSEH jene klarigas sian koncepton:

La **kursmateriale** estas mezurita por elementa kurso, do ĝi entenas la elementan gramatikon kaj celas kapabligi la kursanojn al simpla konversacio pri la plej necesaj ĉiutagaj aferoj. La celo estas ebligi al la publiko, ke ĝi povu post du-tri monata lernado vere uzi la lingvon en korespondado kaj parolo. Tamen, oni ne ŝarĝu la lernantojn per multe da vortoj. La ampleksigo de la vortrezoro restu tasko de la praktiko mem. Fari sporton el instruado de vortoj estas sensenca laboro: verŝi akvon en senfunda barelon. Anstataŭ tio li preferas igi la lernantojn esprimi iliajn pensojn en simpla maniero, kaj okaze de malhavo de necesa vorto per ĉirkaŭskribo\*. Tiamaniere la kurso utilas ankaŭ kiel ekzerco de pensado.

La **metodo** estas kombinaĵo de la gramatika kaj de la rekta metodoj, konforme al la specialaj ecoj de Esperanto. Dum kiam en la naciaj lingvoj la gramatiko estas labirinto konfuziga, en Esperanto ĝi estas tiom klara, ke ni tute ne bezonas eviti ĝian instruadon. Male: la instruado de Esperanto devas esti gramatika. Tial li ordigas la instruatajn gramatikajn sistemojn en sistema sinsekvado gradigita ... Dum la kursoj li ne donas la oficialajn nomojn de la gramatikaj elementoj. Efektive ili nenion utilas, kaj li opinias ke tio povas resti tasko en la komenco de la daŭriga kurso ... Li klopodas konduki la lernantojn, ke ili mem eltrovu la solvon de gramatikaj problemoj, kaj ili mem konstatu la regulon. La efiko de tia procedo estas, ke la lernanto streĉas la atenton kaj pensadon, ĝojas pri sia eltrovo, kaj tiu travivaĵo utile servas la komprenon kaj memoron. Li ne faras komparon inter la reguloj de Esperanto kaj aliaj lingvoj, ĉar tio malofte utilas, ofte malutilas pro la kaprica malordo en la nacilingvaj gramatikoj. Aliflanke la rekta metodo donas grandajn avantaĝojn: la tujan parolan uzon de la lingvo, instigon pensi en la lernata lingvo, bonan kaj facilan perceptadon pro demonstrado ktp. Cseh volis profiti la avantaĝojn de ambaŭ metodoj per kombino.

La **konversacia formo** ludas gravegan rolon kaj ĝi servas la devizon: paroligu la lernantojn. Li klopodas, ke la kursanoj parolu pli multe ol la instruanto dum la lecionoj.

**Kuna respondado** havas du utilojn: unue ĝi kuraĝigas tro modestajn personojn al respondado, due ĝi ŝparigas multan tempon, kiun necesigas la individua demandado. Ĉe la sistemo de kuna respondado povas partopreni en unu kurso grandnombra lernantaro. Tamen — kompreneble — oni aplikas ankaŭ individuan respondadon de tempo al tempo.

La **nacia lingvo** ne estas uzata en la kurso. Nur en la komencaj lecionoj la instruisto bezonas la helpon de tradukisto, plie por rompi la eble enuigan monotonecon de la gramatikaj. La nacian lingvon oni uzu nur ĉe ekstrema neceseco. Ĝia uzado povas esti tre utila ekster la leciono, precipe ĉe la publika korektado de la hejmaj laboraĵoj.

**Fremdlanda instruisto** estas tre grava utilaĵo. Ne nur el la reklama vidpunkto, ĉar fremdulo estas ĉiam pli alloga ol samlandano, sed ankaŭ pro tio, ke la lernantoj tuj de leciono al leciono havas la ĝojigan kontentecon, ke ili povas jam per la lernata lingvo kompreni kun alinaciano. Do, la lernantoj tuj travivas la praktikan utilecon de la lingvo kaj ricevas bonegan argumenton pri la uzebleco de Esperanto inter diversnacianoj. Aliflanke la instruisto mem gajnas el tia situacio, ĉar la manko de komuna nacia lingvo devigas lin pli atente kaj energie labori.

**Sen lernolibro** okazas la kursoj pro du gravaj kaŭzoj: unue, ĉar entuziasmaj lernantoj ofte antaŭlernas kaj per tio ili aŭ konfuzas sin mem, aŭ ĝenas la progresadon de la aliaj. Due, ĉar la lernolibro ofte kutimigas al malordo. Bela vetero, interesa filmo aŭ societo facile forlogas la lernanton de la leciono, ĉar li ja povas relerni la lecionon hejme el la libro. Dum la leciono la sama preteksto tentas al distriĝo. Sed ne havante libron oni devas regule viziti la kurson kaj streĉi la atenton.

\* t. n. „bezik“- (basic)-principo.

**Kapti la atenton** — jen la ĉefa tasko de la instruisto, ĉar ĝi estas la ĉefa kondiĉo de la sukceso. Instrui neatentantajn homojn egalas skribi sur akvon. Sed teni plenan atenton dum la lecionoj estas tre malfacila tasko. La lecionoj okazas vespere, la lernantoj estas lacaj pro la tuttaga laboro. La instruisto devas esti preskaŭ sorĉisto por ligi sian lernantaron. Severece, rigida disciplinado, perforta streĉigo de la atento ne helpas, sed eĉ malutilas. La sola helpo estas, lerte eluzi psikologiajn faktorojn. Tial li elektis la jenan regulon: ligi ĉiun instruadon al agrabla, amuza travivaĵo. Tiamaniere ricevitan instruadon oni firme fiksas kaj tenas en memoro, kaj la instruisto skribas ne sur akvon sed ĉizas en ŝtonon. Anstataŭ seka lingvokurso ni faru agrablan konversacion kun allogaĵoj, dum kiu la partoprenantoj senkonscie, ofte eĉ kontraŭvole lernas. Se ekzistas modernaj kuracistoj, kiuj sanigas per rido, ni ne timu provi instrui per rido. Tia provo estas la kurso kaj se oni serĉas por ĝi ĝustan adjektivon, tiam ĝi devos esti proksima al la vorto „psikologia“. Ĉiu laboranto kun homoj — do ankaŭ la lingvoinstruisto — plej prudente agas, se li klopodas ekkoni la homan psikon kaj se li poste uzas tiun konatan psikon kiel fundamenton por la konstruado.

**Hejma laboraĵo** estas laŭvola. Por eviti la impreson pri lernado li uzas demandojn. La respondo estas pli amuza ol laborsenca, tamen ĝi devigas al la praktikado de multaj gramatikaj aferoj. El la respondoj oni povas kompili statistikon, utiligeblan por kursfina amuzo. Kelkaj konsiloj de Andreo CSEH al la instruantoj:

1. En la kurso la plej grava estas la persono de la instruisto. Li povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la plej bonan. Tial klopodu regi vin kaj vian laboron kaj fariĝu majstro en via fako.
2. Ne rapidu en la instruado! Tio tute ne helpas. Se ne restas sufiĉa tempo prefere forlasu partojn, precipe negravajn rakontaĵojn.
3. Preparu vin bone al ĉiu leciono, por ke vi estru la materialon kaj la lernantaron.
4. Ne donu tro grandan materialon en unu leciono, ĉar la cerbo bezonas tempon por digesti, same kiel la stomako.
5. Dum la lecionoj parolu malrapide kaj tre klare. Haltu inter la frazpartoj, por ke la vortoj ne kunfluu. En la parolo oni povas vidi la distancojn inter la vortoj kiel en la skribo. Per lerta kaj agrabla, sed ne tro aktoreca modulado de la voĉo pentru la enhavon de viaj diraĵoj.
6. Faru nur tiajn demandojn, je kiuj oni povas doni certan respondon. Postulu ĉiam kompletan respondon, ne akceptu nur „jes“ kaj „ne“. La celo de la metodo estas ĝuste la paroligo de la lernantoj.
7. Komencu ĉiun lecionon per kelkaj demandoj, kiuj ripetas la materialon de la lasta leciono.
8. Koloran kreton uzu por atentigi pri novaj gramatikaĵoj.
9. Decan bonhumoron, ŝercojn apliku inter pripensitaj limoj. Nobla gajeco origu vian laboron. Zorge evitu demandon aŭ aludon, kiu povus ofendi aŭ ĝeni iun. Faru vian laboron elegante por imponi.
10. Vivigu vian tutan laboron per amo al Esperanto kaj amo al viaj lernantoj. Tiam vi brile sukcesos kaj niaj konsiloj estos superfluaĵj.

§ 14 La plej granda valoro de la Cseh-metodo estas la konsekvenca **organizado de la studmaterialo**. Jen kelkaj variantoj pri la komencoj de la kursoj:

#### 1-a varianto:

La instruisto desegnas punkton

kaj skribas	.	punkt-o
el punkto faras komon	,	kom -o
el komo faras cirklon	o	cirkl -o
aldonante novan komon vi ricevas pomon	qo	pom -o

Oni substrekas per kolora kreto la radikojn kaj samtempe diras „radiko“, poste substrekante ĉiujn „o“ oni diras: „per -o substantivo“. Sekvas la streketo: Kvadrato, triangulo kaj iliaj kombinaĵoj. Grandaj kaj malgrandaj, el ili oni desegnas katon, hundon, birdon, per kolorkreto oni instruas la kolorojn, per koloroj florojn, herbon, arbon, ktp.

**2-a varianto:** KIO-TIO. La instruanto montras la ĉirkaŭantajn objektojn kaj diras: „Tio estas lampo. Tio estas kreto. Tio estas tabulo.“ Poste li demandas: „Kio estas tio?“ montrante samtempe la objekton. Poste li metas la kreton sur la tablon kaj demandas: „Kio estas sur la tablo?“ Post bona respondo li prenas de sur la tablo la kreton kaj demandas: „Kio estis sur la tablo?“ (-AS, -IS)

**3-a varianto:** per internaciaj vortoj. Li elektas internacie konatajn vortojn, ekzemple: telefono, aparato, biciklo, vagono, lampo, benko, ktp., kaj per ili faras frazojn kaj demandojn.

**4-a varianto:** varianto de interkonatiĝo. Enirante la instruanto diras: „Saluton! Mi estas sinjoro X“. Post kelkfoja ripeto li iras al iu sinjorino kaj diras: „Mi estas sinjoro X, vi estas sinjorino Y“. Same: viro — virino, fraŭlo — fraŭlino. Unua gramatikajo: -IN, MI, ESTAS, VI, sekvas: LI, ŜI montrante iun: Li estas sinjoro Z, ŝi estas sinjorino W, ktp. Poste la pluralo: Ili estas sinjoroj, ili estas sinjorinoj. Poste: Kiu estas vi?

La sekreto de la sukceso estas: paroli forte, kuraĝe kaj elegante! Sed ne sufiĉas diri nur la nomon. Ni devas diri ankaŭ la profesion.

— Mi estas profesoro.

— KIO estas mi?

— Vi estas profesoro.

KIU? = Petro Kovács.

KIO? = profesoro.

Poste la instruanto demandas ĉiun aparte: Kiu estas vi?

Kio estas vi?

En la hispana lingvo estas interesa kutimo. Kiam oni skribas demandan frazon, oni metas signon ne nur al la fino, sed ankaŭ al la komenco. „Rigardu! (oni montras hispanlingvan tekston) En Esperanto la renversitan demandosignon oni povas legi: Ĉu. „Ĉu mi estas profesoro? — Jes.“ Oni demandas ĉiun lernanton. „Ĉu mi estas lernanto? — Ne, vi ne estas lernanto, vi estas profesoro.“

La materialo konstruiĝas poste jene:

„Profesioj, LI, ŜI, sed (LI — sinjoro, ŜI — sinjorino)

Ne estas ŝi, ne estas li sed ĜI (ĜI estas seĝo).

Klasaj mebloj: LA: La seĝo estas meblo.

La adjektivo: La kreto estas blanka.

Je la fino de la unua studhoro la instruanto surskribas sur la tabulon la salutojn: Bonan matenon! tagon, vesperon, nokton, apetiton, dankon. Ĝis revido!

Jen kelkaj karakterizaj ekzemploj pri la instruado de gramatiko:

#### Pluralo:

Kio estas ĝi? Ĝi estas kreto.

kreto 1

Kio estas ĝi? Ĝi estas kreto.

+ kreto 1

kreto 1

Ĝi estas matematiko! Kreto kaj kreto estas kreto. Unu kaj unu estas unu. Malbona matematiko!

kreto 1

+ kreto 1

= kretoj 2

unu kreto

kaj unu kreto

estas 2 kretoj

Kio estas la bona matematiko? Unu kaj unu estas du.

Kreto kaj kreto estas kretoj.

blanka kreto

+ blanka kreto

= blankaj kretoj

verda kreto

+ verda libro

= verdaj ĉokoladoj? Ne!

= verdaj kreto kaj libro

**Akuzativo:** Oni enkondukas per rakonteto.

„Mi rememoras pri interesa epizodo. Antaŭ kelkaj jaroj mi instruis en Bukaresto. Bukaresto estas la ĉefurbo de Rumanio. Estis tie afabla fraŭlino. Post la tria leciono la fraŭlino forlasis la kurson. Mi demandis ŝian amikinin: „Kio estis la kaŭzo?“ La amikino diris: „Ho, ŝi estis tre malkontenta. Ŝi plendas, ke la kurso estas tre seka kaj malinteresa, ĉar la profesoro instruas nur la vortojn: tablo, muro, fenestro, lampo. Sed ili tute ne estas interesaj vortoj.“ La respondo konvinkis min, ke mi devas meti en la kurson pli interesajn vortojn. Sed kiuj vortoj estas interesaj? Por trovi ilin, mi komencis la observadon. Ofte okazis, ke oni petis de mi vortaron. Mi donis vortaron, kaj ili serĉis en la vortaro. Mi atente observis, kiu vorto estas la unua, kiun ili serĉas en la vortaro. Kaj mi konstatis, ke tiu unua vorto estis ĉiam la sama: **amas** (surskribas sur la tabulon). Mi tuj metis ĝin en la kurson. Kaj efektive, de post tiu tempo neniu fraŭlino forlasis la kurson. Sed ankaŭ la sinjoroj ne forlasis la kurson!

Rigardu! Sur la tabulo staras la plej interesa vorto. Sed ĝi estas sola. Tio ne estas bona. Rigardu! Antaŭ ĝi kaj post ĝi estas liberaj lokoj.

	amas	
La laboristo amas.	Kiu amas?	La laboristo amas.
Sed estas ankoraŭ libera loko!		

La laboristo amas la oficistino.

Ĉu, ĝi estas bela frazo?  
Jes, ĝi estas bela frazo.

(Oni skribas sur tri paperpecetojn la vortojn: „la laboristo“, „amas“, „la oficistino“ kaj ĵetas ilin en ĉapelon. Oni cirklas, poste proponas al la lernantoj elpreni po unu. Formiĝas du frazoj. Oni skribas ilin sur la tabulon.)

La laboristo amas la oficistino.  
La oficistino amas la laboristo.

— Kio estas sur la tabulo?	— Sur la tabulo estas du frazoj.
— Ĉu la frazoj estas bonaj?	— Jes, la frazoj estas bonaj.
— Ĉu la du frazoj estas egalaj?	— Ne! Ne!

„La du frazoj estas egalaj, sed ili ne estas bonaj. Estas fatala miskompreno! Sed en Esperanto estas malgranda, sed tre utila kaj grava litero: „-N“. Ĝi staras ĉiam post la objekto de la ago.

Ĝi klarigas la frazojn. Ni vidu! (-n per ruĝa kreto)

La laboristo amas la oficistinon.  
La oficistinon amas la laboristo.

Ĉu vi scias, kiu amas? — Jes, nun ni scias: la laboristo.

Se ne estas litero „n“, mi ne scias kiu amas!

Nun mi ŝanĝas la lokon de litero „n“.

La laboriston amas la oficistino.

Ĉu vi scias kiu amas? — Jes, la oficistino.

Same: Li amas ŝi.

Li amas ŝin.

Kiu? — Li. Kiun — Ŝin.

Lin amas ŝi.

Poste oni ekzercas la akuzativon per la helpo de la verboj: tuŝi, teni, montri, fari . . .

**La vortdifinoj** estas ĉiam tre trafaj kaj ŝercaj:

Kion signifas atentas? — Malfermas la fenestrojn kaj la longajn pordojn (t.e. la okuloj kaj la oreloj).

Kion signifas legas? — Rigardas la vortojn kaj komprenas ilin.

„La malbona lernanto ne atentis. Ĉu la instruisto estas feliĉa? Ne, sed malfeliĉa. Kion faras li? Li prenas unu meblon, longan kaj maldikan, sed fortan meblon, la pedagogian meblon kaj li batas la malbonan lernanton.“



Ankaŭ dum la komuna korektado de taskoj oni agas same. Jen ekzemplo: „La erara frazo estas: Via okuloj estas nigra. Ĉu estas bona la frazo? Ne. Ĝi signifas: ŝi havas du okulojn sed nur unu apartenas al ŝi kaj nur unu estas nigra.“

§ 15 Dum la evoluvo de metodiko la esploristoj konvinkiĝis, ke neniu „ekskluziva“ metodo taŭgas. Por konstrui efikan metodikan sistemon oni devas elekti la pozitivajn elementojn de ĉiuj antaŭaj konceptoj, sistemigi ilin laŭ certa koncepto kaj tiamaniere elformi science motivitan kaj pruvitan instrumentodan sistemon. Tiuj sistemoj nomiĝas **elektantaj metodoj**. Kiel ni vidis en la antaŭaj paragrafoj, ankaŭ la Cseh-metodo estas elektanta. La diversaj variantoj de la elektanta metodo diferenciĝas laŭ la kombino de diversaj elementoj, laŭ ilia proporcio. Dum la lasta tempo krute ŝanĝiĝis la lingvistika koncepto kaj ĝenerale la sciencaj esplormetodoj dank' al la cibernetiko. En lingvistiko kaj poste en lingvometodiko aperis la klopodo, esprimi ekzakte kvazaŭ-matematike la opajn fenomenojn. Samtempe kapturniĝe evoluas la tekniko kaj liveras novajn kaj modernajn aparatojn, instalaĵojn uzeblajn en la lingvo-instruado. Fine, la internacia trafiko atingis tiajn mezurojn, ke la bezono de fremda lingvo urĝegas la instruistojn atingi rapidajn kaj tuj praktikeblajn rezultojn. Observante tiujn faktorojn elformiĝis la plej moderna varianto de la elektantaj metodoj, la t. n. KA-metodo (la inicialoj de kompleksa-aktiva).

§ 16 La KA-metodo efektive estas la modernigo de CSEH-metodo, tamen havas kelkajn tute specifajn, partikularajn principojn.

### La KA-metodo

- a) uzas ekzaktan metodon **en la planado de la studmaterialo**; laŭ matematike esprimeblaj parametroj sistemigas ne nur kvalite, sed ankaŭ kvante la studmaterialon;
- b) konstruas la gramatikan sistemon de la lingvo sur la sistemon de **strukturoj**; konstruante la struktur-sistemon de la lingvo aranĝas ilin en logika sinsekvo, observante la bezonojn de la instruado;
- c) konstruante la fundamentajn didaktikajn dokumentojn (minimumojn, instruprojektojn, struktursistemon) priententas la eblecojn de **programita instruado**, t. e. organizas la studmaterialon en tia formo, ke ĝi estu taŭga ankaŭ por instrumaŝinoj;
- d) formulante la bazajn metodikajn principojn observas la rezultojn de la psikolingvistiko, precipe la fenomenojn de la interferenco kaj transferado. La konkreta instruoprogramo baziĝas sur la science ellaborita **metodologia-tipologio**;
- e) dum la instruado uzas intensive la modernajn teknikajn instruhelpilojn ĝis la lingvolaratorio;
- f) instruas lingvon en sia funkcio, t. e. kiel rimedo por transdoni komunikaĵojn. Tiu principo postulas maksimuman uzon de Esperanto dum la studhoru. La baza unuo estas ĉiam la frazo kiel unuo de komunikaĵo. La frazo devas esti komunikiva, t. e. enhavi informacion. Tiun postulon oni povas plenumi nur tiam, se la lingvo-instruado estas vivproksima kaj disvolviĝas en natura aŭ kvazaŭnatura atmosfero. La gepatra lingvo servas precipe kiel ilo de kontrolo, la gramatiko estas instruata funkcie (en strukturoj) kiel rimedo komprenigi kaj firmigi la kapablojn. La sekvaj paragrafoj detaligas la opajn momentojn de la KA-metodo.

### LA INSTRUADO DE LA LINGVA MATERIALO

§ 17 La **fonetiko kaj grafiko** de Esperanto ne kaŭzas instruproblemon por tiuj, kiuj ankaŭ en gepatra lingvo uzas la latinan grafikon. Estante preskaŭ fonetika lingvo kaj ne havante ortografiajn esceptojn — la instruado de grafiko kaj fonetiko okazas preskaŭ instinkte. (Por nacioj, kiuj uzas alian grafikon ol la latina, la Esperanto-grafiko estas la plej taŭga rimedo alproprigi la latinan grafikon!) En la grafiko prezentiĝas nur kelkaj facile solveblaj problemoj (ekz. la uzo de majuskloj, de skribosignoj, precipe de dividostreko kaj apostrofo, la uzo de supersignoj, ktp.)

La fonetikon oni instruas laŭ imita metodo. Tio signifas, ke la prononco kaj la intonacio de la instruanto estas decida: la lernantoj ne povas havi pli bonan prononcon ol la instruanto! Tio devigas la instruanton esti tre severa rilate la prononcadon.

Ĉar la baza unuo estas la frazo, la instruisto prononcas la sonojn ĉiam en ilia ĉirkaŭaĵo, la lernanto ricevas la akustikajn impresojn en frazo. Se, observante la artikulacian bazon de la lernanto (t. e.: la fonetika kaj fonemika sistemo de la gepatra lingvo), estas Esperanto-sonoj, kiuj tre diferencas de la gepatro-lingvaj sonoj, aŭ eĉ forestas, tiam la instruanto devas ilin pli intense ekzerci en vortoj eĉ aparte kiel izolitaj sonoj. Ni devas esti tre severaj precipe en tiu kazo, kiam la misprononco ŝanĝas aŭ detruas la sencon de la vorto.

En la instruado de ĝusta prononcado estas tre valoraj la gramofon-diskoj de elstaraj esperantistoj, la sonbendoj de UEA\*. Oni povas surbendigi la diversajn radiodissendojn, por observi la ĝustan prononcadon.

Dekomence ni konsekvence korektu la prononcerarojn de la lernantoj, sed ni atendu, ĝis ili finas la frazon. Ni alkitimigu la lernantojn legi bele kaj esprimplene la legaĵojn, paroli laŭte kaj klare. La bonan prononcadon de la lernantoj rezultos nia afabla admono kaj korekto, la necedema persisto.

§ 18 **La leksiko** de Esperanto konsistas el vortelementoj. Tiu estas specifa problemo por ĉiu-lingvano, ĉar en la naciaj lingvoj la leksikaj unuoj estas la vortoj. Jam dekomence ni devas elformi en la lernantoj la kapablon instinkte kaj aŭtomate ekkoni la vortstrukturon kaj same mekanike formi vortojn el elementoj. Tio signifas, ke la vortstrukturon oni devas jam en la komenca stadio konsciigi: kret-o, instru-ist-o, lern-ant-in-o.

La instruleksiko laŭ KA-metodo estas tiel organizita, ke en la komenca periodo oni instruas konkretajn proksimajn al la situacio leksikajn unuojn. Tiuj estas montreblaj nature. Ekz. tabulo, kreto, benko, lernanto, ktp. La natura demonstrado estas la plej oportuna semantigo (t. e. malkovro de la senco).

La vortoj aperas ĉiam en frazoj, kiuj havas konatan strukturon. (Estas ja baza principo, ke oni instruu novajn leksikajn unuojn per konata gramatikaĵo kaj inverse.) Kelkfoje la nova leksika unuo estas divenebla el sia ĉirkaŭaĵo. Se ne estas montrebla nature aŭ age (mimike) ni montru ĝin bilde. Jam en la komenca periodo aperas kaj poste pliiĝas tiaj vortoj, kiujn oni povas montri nek nature, nek bilde, nek age aŭ mimike. Tiam ni devas uzi aliajn rimedojn de semantigo. La unulingva (t. e. ne traduka) semantigo povas okazi per:

- a) samsenca vorto (sinonimo): ekz. estro = ĉefo
- b) parencenca vorto: ekz. oceano = granda maro
- c) vortanalizaj difinoj: solvebla problemo = problemo, kiun oni povas solvi
- d) difino, ĉirkaŭskribo: ujo = enestas tute; ingo = ne enestas tute; scii parkere = scii ion, sen rigardi la tekston.

Estas ja memkompreneble, ke la vortoj enestantaj en la unulingva semantigo, devas esti jam konataj. Ekzemplojn por unulingva semantigo vi trovas abunde en la lernolibro Sz, 2. Fine, se la semantigo ne estas solvebla per demonstrado aŭ unulingva difino, ni devas ĝin traduki. La traduko, cetere, en opaj kazoj servas nur kiel kontrolo, se ni ne estas konvinkitaj, ke la lernantoj komprenis la koncernan leksemon.

§ 19 En la antaŭa paragrafo ni montris la formojn de semantigo, t. e.: la prezento de novaj leksikaj unuoj kaj la malkovro de la sememo. Sed la kompreno estas nur la unua paŝo. La leksemon oni devas koni por poste mekanike uzi ĝin en la parolo. De la kompreno trans la kono ĝis la kapablo gvidas la intensa ripetado. Por scipovi intense ekzerci la novan leksemon, **la kvanto** de pohore instrueblaj novaj leksikaj unuoj ne povas esti pli ol 10 (ĝenerale de 6 ĝis 10) en la komenca periodo, poste tiu nombro proporcie plialtiĝas. La plifirmigon de la leksemo helpas diversaj metodikaj artifikoj, ekz. trafaj frazoj, proverboj, ŝercoj, enigmoj, kantoj, versaĵoj, ĝenerale la parkerado.

\* Magnetofona Servo de UEA: estas riceveblaj sonbendoj de elstaraj, diversnaciaj esperantistoj kun tre valoraj enhavo.

§ 20 **La gramatiko de Esperanto** — kontraŭe al naciaj lingvoj — estas la facila parto de ĝia materialo. Ĝia instruado kaŭzas nenian problemon. Tamen, ĝia facileco ofte bremsas la elformigon de la mekanika parolkapablo. Tiu ŝajna paradokso originas en la falsa percepto de la fenomeno. La kompreno kaj kono de la gramatika sistemo tute ne signifas ĝian instinktan, aŭtomatan praktikon. La kompreno kaj kono de gramatiko postulas nenian energion kaj tempon. Sed ĝia aŭtomatigo pretendas longan kaj konsekvencan ekzercadon. Kiu forgesas tiun ĉi fundamentan faktan, neniam kapablos paroligi siajn lernantojn!

La baza principo de gramatika instruado laŭ KA-metodo estas, ke oni instruas gramatikon en sia funkcio. Dum la kurso aparta instruado de gramatika teorio ne okazas. La gramatikajn kategoriojn oni enkondukas ĉiam konversaciante kaj demonstrante multajn frazojn, en kiuj enestas la nova kategorio, kaj kiam la instruanto konvinkiĝis, ke la lernantoj rimarkis kaj konsciis la novan fononemon, li mallonge, per unu — du frazoj formulas la regulon. Tiu estas la **indukta procedo**: el praktikaj faktaj ni eltiras la ĝeneralan regulon. La gramatiko-instruado de Esperanto okazas ĉiam indukte!\* Ekzemplo por la instruado de akuzativo kaj prepozicio „per“ laŭ Sz, 1, III/B leciono (paĝo 19):

(La rekvizitoj estas jam antaŭpreparitaj)

„Jen la tabulo! Mi montras tabulon. Kion mi montras? (— Vi montras tabulon.)

Kion vi vidas? Ni vidas tabulon.

Nun mi desegnas. Mi desegnas bildon. Kion mi desegnas? Vi desegnas bildon. Ĉu vi vidas la bildon? Jes, mi vidas la bildon. Kia estas la bildo? La bildo estas bela. Kian bildon desegnas la instruisto? La instruisto desegnas belan bildon. Ĉu vi vidas ĝin? Jes, mi vidas ĝin. Ĉu vi vidas min nun? Jes, ni vidas vin.“

El tiuj ekzemploj la lernantoj rimarkas, ke la finaĵo de la akuzativo estas — „n“, kiun povas alpreni la substantivo, adjektivo, la persona kaj demanda pronomo. Post la konversacio la instruisto skribas sur la tabulon: LA INSTRUISTO DESEGNAS BILDON! — KION? NI VIDAS ĜIN!

Elformiĝis nova strukturo:

— O	— AS	— ON
-----	------	------

Kiel oni povas rimarki, per tri konataj transitivaj verboj (montri, vidi, desegni) oni povas prezenti la novan gramatikaĵon. Per kelkaj aliaj oni povas ekzerci: ŝati, manĝi (ekz. ĉokoladon), kolekti, skribi, lerni, legi. En tia kazo la ekzercado de akuzativo ebligas la ripetadon de preskaŭ ĉiuj konataj transitivaj verboj.

§ 21 La dua principo de gramatika instruado post la funkcia principo estas la strukturisma principo. Samtempe, la sistemoj de strukturoj helpas la konsekvencan konstruon de la gramatika instrumaterialo kaj minimumoj.

Oni distingas vortstrukturon kaj frazstrukturon. La vortstrukturon montras la interrilaton de vortelementoj ene de la vorto, ekz. DIS-ER-IG-I, 4-elementa strukturo, kies formulo estas: Pr + SU + SU + F (Pr = prefikso, Su = sufikso, F = finaĵo). La frazstrukturo montras la interrilaton de frazelementoj en la frazo. Jen kelkaj modeloj:

— O	ESTAS	— O
— O	ESTAS	— A
— O	— AS	— E
— O	— AS	— ON. ktp.

En Esperanto la gramatika minimumo eniras en la leksikan minimumon. Tiu estas unika aperaĵo en la lingvo-metodiko kaj klariĝas per tio, ke la leksika inventaro de la lingvo konsistas el elementoj kaj leksikaj kaj gramatikaj: — A, — O, — AS, — IS, — ANTA ktp., same enestas en la leksika inventaro kiel PATR-, TABL-, BEL-, AM-. Ĉar ĉiuj gramejoj enestas en la baza minimumo, signifus tio, ke la tutan bazan gramatikon oni instruu dum unu kurso. Laŭ la tradicia praktiko de Esperanto la bazan gramatikon oni instruas dum unu kurso. Sed en la lerneja sistema instruado tion oni povas dividi je du lernojaroj (vidu la materialon de Sz, 1!)

\* La inversa procedo, t. e. de la ĝenerala, abstrakta regulo al la opa konkreta fakto nomiĝas **dedukto**.

## La vulpo kaj la vinberoj\*

Priskribo de studhorro de Dragan Sentov, Bulgario

### I. Enkonduko

Por fari senperan enkondukon de la nova leksiko, la instruisto intence respondigas la plimulton de la lernantoj al ordinaraĵaj ĉiutagaj demandoj:

- „Ĉu vi ŝatas manĝi pomojn?“
- „Ĉu vi ŝatas manĝi pirojn?“
- „Kiu ŝatas manĝi vinberojn?“

Samtempe la instruisto desegnas grapolon da vinberoj kaj aliajn fruktojn, skribas la vorton **vin / bero** kaj klarigas, ke el vinberoj oni faras vinon.

- „Ĉu vi lavas la vinberojn?“
- „Kial oni lavas la fruktojn?“

La respondoj estas tre simplaj, ekz. la respondo de la lasta demando povas esti la jena: „Ĉar ili ne estas puraj.“ Tuj sekvas la demando:

— „Kial oni ne manĝas malpurajn fruktojn?“ Se la instruisto ne ricevos la deziratan respondon, li mem respondas: „Ĉar oni povas malsaniĝi.“ Aperas, do, eduka momento: Antaŭ ol manĝi — lavu la fruktojn! Sekvas vico da novaj demandoj en kiuj enestas la novaj vortoj renkontotaj en la legaĵo. Ekz.:

— „Ĉu la vinberoj estas dolĉaj?“ Post jesa respondo la instruisto aldonas: „Jes, sed se ili estas maturaj“, kaj skribas sur la nigran tabulon la novan vorton **matura**, klarigante, ke la maturaj fruktoj estas dolĉaj kaj la nematuraj acidaj kaj kutime verdaj. „Do, la nematuraj fruktoj ne havas bonan guston, ne estas bongustaj.“ Nun la instruisto skribas la vorton **bon / gusta**, poste demandas:

- „Ĉu la maturaj vinberoj estas bongustaj?“
- „Ĉu la nematuraj vinberoj estas dolĉaj?“
- „Sed, se vi ankoraŭ ne manĝis la vinberojn, ĉu vi estas certaj, ke ili estas acidaj?“

Sekvas nea respondo. La instruisto daŭrigas:

— „Sed, se la vinberoj estas ruĝaj ili ŝajnas bongustaj“, kaj skribas sur la nigran tabulon **ŝajni** kaj aldonas: „Mi ne estas certa, ĉu la vinberoj estas bongustaj, sed ili ŝajnas al mi bongustaj. Kiam mi manĝas ilin, mi jam estas certa, ke ili estas bongustaj. Ili jam ne ŝajnas, ili estas bongustaj.“

Poste tute ŝerce la instruisto diras: „Sufiĉe ni manĝis fruktojn, ni estas jam sataj. Nun ni volas trinki akvon, ĉar ni estas soifaj. Homo, kiu longe ne trinkis akvon estas soifa,“ kaj li skribas **soifa**, poste demandas:

- „Ĉu vi estas soifa?“

Sendepende de la respondo, ĉu jesa aŭ nea, la instruisto diras, ke li estas iomete soifa, trinkas iom da akvo pli antaŭe alportita, skribas la vorton **iom / et / e** kaj klarigas, ke ĝia signifo estas proksima al malmulte.

Poste tute senpere li rakontas pri la soifa vulpo kaj la vinberoj. (Kiam la vulpo devas salti por kapti la vinberojn, la instruisto mem lerte saltetas kvazaŭ estus kaptonta ilin.) Ĉe la fino de la rakontado la instruisto skribas la titolon: **La soifa vulpo kaj la vinberoj**. Sekvas:

### II. Antaŭekzercado de la nova materialo

Rakontinte la konatan fablon, la instruisto starigas demandojn laŭ la sama sinsekvo. Li klarigas la vorton **kapti** jetante kaj kaptante ekz. la kreton aŭ ion alian.

### III. Legado

Jam nur tiam la instruisto malfermigas la librojn kaj legigas kelkajn el la plej bonaj lernantoj, unue poparte poste la tutan tekston. Se necesas, li korektas la prononcon. Ĉar la teksto estas mallonga, ĝin povas legi ankaŭ kelkaj el la malpli bonaj lernantoj.

\* La instruota leciono estas parto A de la deknua leciono de „ESPERANTO 1“ de d-ro Szerdahelyi.

## IV. Postekzercado kaj aktualigo

Denove sekvas demandoj, sed iom pli ĝeneraligitaj, el kiuj eltiriĝas la plano:

— „Kion vidis la soifa vulpo?“	}	1. La soifa vulpo vidas vinberojn.	
— „Kion ĝi volis fari?“		2. Kaptado de vinberoj.	
— „Kion faris la vulpo, kiam ĝi ne atingis la vinberojn?“		3. La vulpo foriras.	
— „Kion diris ĝi?“		}	4. Konkludo.
— „Ĉu ĝi vere ne volis manĝi la vinberojn?“			
— „Laŭ vi, kial la vulpo forlasis la vinberojn?“			
— „Ĉu estas homoj, kiuj similas al la vulpo?“		— Fieraj homoj similas al la soifa vulpo. — Ne estu fieraj, ĉar oni priridos vin.	

## V. Designado de hejmtasko

- a) Legu la legaĵon laŭvoĉe.  
b) Skribe: La vulpo rakontas sian aventuron al la lupoj.

C Informoj el la pedagogia vivo

## Progresiva paŝo en nia movada historio

Kvinlanda pedagogia didaktika eksperimento pri la oficiala enkonduko de Esperanto en lernejojn  
1971/72 — 1973/74

De d-ro Istvan Szerdahelyi, Hungario

La III-a kunordiga konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn, okazinta en Maribor (Jugoslavio) de la 27-a ĝis 29-a de marto 1970, en la kadro de la Internacia Jaro de Edukado 1970, proklamita de UNESKO, sub la aŭspicio de S-ro Slavko Bohanec, sekretario pri kulturo kaj klerigo de SR Slovenio, akceptis konkludojn, kies efiko povas havi nunmomente ankoraŭ neantaŭvideblan influon sur la estontan evoluadon de la tuta movado.

Eble la plej granda signifo de la konferenco estas, ke ĝin oficiale partoprenis ne nur la 42 reprezentantoj de Esperantomovado el Austrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, sed ankaŭ la reprezentantoj de la klerigaj ministerioj de ŝtataj membroj, invititaj diplomatie. Nur Italio ne havis ministerian reprezentanton, sed S-ro Luigi Russo, la prezidanto de la komisiono por publika instruado kaj belartoj de la senato de respubliko Italio esprimis skribe sian interesiĝon por la laboro de la konferenco, ne povinte ĝin ĉeesti pro la troa okupiteco.

La konkludojn de la konferenco, pro ilia gravega signifo, ni citas laŭvorte.

1. La lernejoj komisionoj de ŝtatoj-membroj klopodu krei konstantan kontakton kun la superaj oficialaj organoj kompetentaj pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn.
2. Surbaze de la raportoj faritaj de opaj landaj lernejoj komisionoj la konferenco instigas al la daŭrigo de la instruado en ĝisnunaj formoj, kaj en la celo de plua evoluigo de Esperanto-instruado proponas al kompetentaj lernejoj instancoj de ŝtatoj-membroj enkonduki eksperimente devigan instruadon de Esperanto en difinita nombro da lernejoj. Estus konsilinde, ke la instruado komenciĝu post 4 jaroj de la elementa lerneja studado kaj ĝi minimume daŭru tri jarojn.
3. La konferenco komisiis la fakan gvidadon de la eksperimenta deviga instruado de Esperanto en lernejoj al la Esperantofako de la Scienca Universitato Eötvös Lóránd en

Budapeŝto kaj ŝarĝas la fakestron organizi laborgrupon el la fakaj reprezentantoj de la opaj lernejoj komisionoj. La tasko de la laborgrupo estas:

a) prepari necesan bazan dokumentaron (instruprojekto, kompleksa didaktika minimumo, instrumentodaj rekomendoj k. a.);

b) fake gvidi kaj sekvi la fluon de la eksperimento kaj raporti pri la fakaj konkludoj de la eksperimento.

4. La konferenco fondas sian informan servon por interna reciproka informado de la lernejoj komisionoj kun sidejo ĉe la konstanta organiza komitato en Maribor.

5. Por demonstri la praktikan valoron de Esperanto-instruado en lernejoj, la konferenco komisiis al Bulgara lerneja komisiono organizi laborgrupon, kiu helpu en tiu laboro (korespondado, renkontiĝoj, ekskursoj, ekspozicioj, kultur-artaj aktivecoj k. s.).


6. Por kunhelpi la realiĝon de tiuj taskoj la konferenco decidis sendi — por informo — la materialon de la tria konferenco al la invititaj oficialaj instancoj.

La protokolon subskribis: Prezidanto de la konferenco, d-ro I. Szerdahelyi, prezidanto de Aŭstria lerneja komisiono J. Wesian, reprezentanto de Bulgara lerneja komisiono Kunčo Valev, prezidantino de Hungara lerneja komisiono Emilia Radvanszky, prezidanto de Itala lerneja komisiono d-ro Mario Dazzini kaj la prezidanto de Jugoslavia lerneja komisiono d-ro Peter Zlatner.

### La antaŭpreparaj laboroj

Post la konferenco la kvin landoj-membroj elektis respondeculojn pri la eksperimento. Ilia tasko estas, konsente kun la oficialaj instancoj de siaj landoj elekti tiujn lernejojn, kie estas taŭgaj kondiĉoj por okazigi la eksperimenton, nome: organizi eksperimentan klason kun deviga Esperanto-instruado, kaj se eblas, paralelan kontrolan klason, en kiu oni instruas alian fremdan lingvon laŭ la samaj kondiĉoj.

La instruantoj kaj la lernantoj kreos jam dum la unua lernojaro intensivan interrilaton multflankan inter si, kaj inter la alilandaj lernejoj partoprenontaj en la eksperimento. Skeme:



La baza principo estas, ke ne interrilatu lernantoj kun lernantoj, sed lernejoj (klasoj) kun lernejoj (klasoj). Tiamaniere la instruistoj povas ŝanĝi spertojn, la lernantoj povas interkonatiĝi, povas kolekti materialon por ekspozicioj, organizi komunan tendaron, ŝanĝvizitojn ktp. demonstrante la praktikan valoron de la Internacia Lingvo.

Post ĉiu eksperimenta lernojaro ni intencas aranĝi Internacian Lernejon ĉiam en alia membro-lando. La IL-on partoprenos po 4 lernantoj el la opaj lernejoj, do 20 lernantoj el la opaj landoj kun 5 pedagogoj, entute 100 lernantoj kaj 25 pedagogoj. Dum la Internacia Lernejo okazos instruado en internaciaj klasoj (po 20 gelernantoj el 5 landoj kun alternative instruantaj pedagogoj, ĉiam el alia lando. Samtempe, la pedagogoj ĉi-okaze ricevos didaktikan pliperfektigon kaj je la fino de la eksperimento ili faros la Internacian Pedagogan Ekzamenon de ILEI. Dum la Internacia Lernejo ni daŭrigos la diversajn eksperimentojn kaj mezuradojn, kaj estos invitotoj, kiuj partoprenos kaj observos la laboron, same reprezentantoj de la ministerioj.

### Baza dokumentaro

1. Jam pretiĝis kaj aperis multoblige la baza Didaktika Morfemaro, entenante la morfemojn laŭ ofteco kaj alfabetorde por la 3jara ciklo.

2. Laŭ la decido de ILEI-konferenco, dum la eksperimento estos uzota unuece la lernolibro Esperanto. 1. Surbaze de tiu lernolibro jam pretiĝis la detale ellaborita morfemaro laŭ:

- a) lernojaro,
- b) lecionoj kaj studhoroj,
- c) tematiko.

3. Estas pretaj la detalaj instruprograme kaj instruplano por la unua lernojaro kaj la perspektiva instruplano por la sekvaj du jaroj.

4. Pretiĝas la detala instrumetoda ellaborado de la opaj lecionoj, kiu entenos la aplikotan metodon, la uzablajn instruhelpilojn, la konkretajn celojn pedagogian kaj praktikan de opaj studhoroj ktp.

Dum la planado ni devis priobservi la fakton, ke malgraŭ ĉiu klopodo krei similajn kondiĉojn, tamen, en diversaj landoj kaj lernejoj la kondiĉoj estos malsamaj (ekz. laŭ la gepatra lingvo de la lernantoj, laŭ la aĝo ktp.). Pro tio ni ellaboris apartajn dokumentojn kaj komisiaj la instruonton elekti la plej konvenan el inter ili.

#### La kvanto de finotaj lecionoj dum la unua studjaro

Lernejo tipo A (du studhoroj posemajne, lernantoj pli junaj) 6 lecionoj.

Lernejo tipo B (du studhoroj posemajne, lernantoj pli aĝaj) 9 lecionoj.

Lernejo tipo C (samaj lernantoj kiel A, tri studhoroj posemajne) 9 lecionoj.

Lernejo tipo D (samaj lernantoj kiel C, tri studhoroj posemajne) 12 lecionoj.

#### La kvanto de alproprigeblaj morfemoj dum la unua studjaro.

Lernej-tipo	Kvanto de morfemoj			entute
	produktive	reproduktive	gramemoj	
A	211	23	87	321
B	369	64	128	561
C	369	64	128	561
D	481	81	154	716

Estas demonstrande:

#### Kontrolo

1. Ke en lernejoj cirkonstancoj instruante Esperanton kaj alian fremdan lingvon laŭ la samaj antaŭkondiĉoj Esperanto estas pli facile, pli efike kaj pli firme alproprigebla ol alia fremda lingvo;

2. Ke Esperanto, kiel baza lingvo, pli efike helpas la lernadon de sekvanta dua fremda lingvo;

3. Ke dum la instruado kaj lernado de Esperanto kreiĝas pli bonaj cirkonstancoj por la praktika uzado de la lernata lingvo. Ĝi kreas:

intensivan kaj pedagogie kaj didaktike tre valorajn kontaktojn inter la lernantoj, inter la instruistoj kaj inter la lernejoj.

La rezultoj de la punkto 3 estas facile demonstrablaj per faktoj (korespondaĵo, renkontiĝoj, Internacia Lernejo, ekspozicioj ktp.)

La rezultojn de la punkto 1 ni demonstros per konkretaj mezuradoj, okazontaj ĉiujare post la unua duonjaro kaj je la jarfino. La mezurado okazos per testoj. Ĉiu instruisto analizos la rezulton en sia lernejo kaj sendos la analizon al la landa respondeculo, kiu sumigos la rezulton kaj sendos al la centro. En la centro aparta laborgrupo sumigos la 5-landan rezulton.

La mezuradon de la punkto 2 oni devas fari post la 3-jara eksperimento. Ĝi bezonas pli longan tempon kaj ankaŭ specialajn cirkonstancojn. Ĝia metodiko nur poste estos ellaborebla.

## Dua grava paŝo en Eŭropo al realiĝo de Esperanto

Reprezentantoj de la instruistaj Esperanto-asocioj el la ŝtatoj Belgio, Germanio kaj Nederlando de 5a ĝis 7a de aprilo 1971 en Antverpeno.

Ili donis al si la nomon:

Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en Lernejojn de la landoj: Belgio, Germanio kaj Nederlando.

La reprezentantoj diskutis la staton de la instruado en la opaj landoj kaj interkonsentis pri estonta kunordiga kunlaboro.

Postulante la ĝeneralan enkondukon de Esperanto en lernejojn, ili proponas lernejan eksperimenton, kiu kun universitata akompano liveru bazon por kompari la rezulton de la instruado de la Internacia Lingvo kaj de aliaj fremdaj lingvoj.

## Unua Internacia Domo de ILEI en Bulgario?

La Bulgara Esperanto-Asocio — Instruista Sekcio — okazigis trisemajnan porinstruistan Esperanto-kurson en Burgas — Medem Rudnik (de la 12-a ĝis 31-a de aŭgusto). Ĵus nov-konstruita domo akceptis pli ol 160 geinstruistojn. Laŭ esperantlingva scipovo ili estis dividitaj en grupojn (A ĝis D).

Instruis komune kun siaj bulgaraj Esperanto-kolegoj prof. d-ro Szerdahelyi (Universitato Budapeŝto) kaj la vicprezidanto de ILEI, rektoro H. Sonnabend. Ambaŭ estis devigitaj uzi la rektan metodon, ĉar ili neniel scipovis la bulgaran lingvon. Potage kvin horojn daŭris la instruado kaj jam komenciĝis je la 7,30 h. Pluraj studobjektoj plenigis la horaron: metodiko, historio, literaturo kaj gramatiko.

Pluraj geinstruistoj preparis sin al ekzameno pri instrukapablo. Tiucele vastan kadron okupis provlecionoj. Tre alte taksinda estas la fakto de la ŝtata aprobo. La ekzamenaj sukcesintoj ricevas nun ŝtatan diplomon, rajtigantan ilin oficiale instrui Esperanton en la lernejoj.

Por la unua fojo ekfunkciis ekzamena komisiono de ILEI. Tri geinstruistoj (s-ino Ingusz, Hungario; sinjoroj Ŝentov kaj Vasilev, Bulgario) kandidatis al la Internacia Ekzameno. D-ro Szerdahelyi kiel prezidanto almembrigis al la komisiono s-ron Kunĉo Valev, Bulgario; kaj s-ron Sonnabend, Germanio. La skriba kaj buŝa ekzamenpartoj daŭris 7 horojn. Ĉiuj kandidatoj bone sukcesis kaj verkos nun la disertacion.

La Bulgara Esperanto Asocio vere ekkonas la problemon, asertante, ke la fundamento de la tuta instruado de Esperanto estas la esperantigado de instruistoj por kapabligi ilin respondece instrui Esperanton. Ne nur vidante la bulgaran flankon, ĝi substrekas la propran sencon de Esperanto — ĝian internaciecon, dezirante la plenan internaciigon de la porinstruistaj kursoj.

La cirkonstancoj estas favoraj. Ne malproksime situante ĉe la bordo de Nigra Maro la nova domo ne nur donas la teknikajn kondiĉojn, sed ankaŭ ebligas aŭtobuse viziti la plaĝon por baniĝi.

La estraro de ILEI certe akceptos la proponitan aŭspicion, ĉar tiaj celkonsciaj kaj konkretaj streĉoj postulas plenan subtenon. S-ro Ivanov kaj liaj kunlaborantoj meritas respekton kaj dankon.



## Pri internacia infangazeto

Hungara Esperanto-Asocio,  
Géza Kurucz, Hungario

Sendube decidan signifon por nia estonteco havas la aliĝo de la lernantaro. Fidinda aliĝo realiĝos nur per multkanalaj efikoj, inter kiuj havus unuarangan rolon apero de **altnivela internacia revuo por lernejanaj**. Ĝiaj paĝoj malfermus eblecojn, montri jam en la komenco la praktikan utilon de Esperanto. Varia, bildriĉa enhavo adekvata al 12-ĝis 16-jaruloj multe kontribuas al la rezultoj de la lerneja instruado.

En sia dua laborkomisiono la Maribora Konferenco de ILEI (27—31. 7. 70) akceptis nian projekton kaj sub paragrafo 1.6.8. komisiis min: „S-ro Kurucz faru pliajn paŝojn por kongregiti la projekton pri eldono de tia revueto.“ Ĉi tiun laboron ni komencas kun aprobo de la estraroj de UEA, ILEI, TEJO kaj HEA, in firma konvinko, ke ni servas urĝan taskon kaj noblan ideon. Ni lanĉos ne ian novan periodaĵon, sed eldonos la plej aktualan kaj gravan varbilon, edukilon lingvan kaj spiritan por vasta, ĉ. 16 000- nombra, lernantaro Sekve ni opinias, ke la celita 5000 ekzempleroj trovos abonantojn inter multaj junaj Esperantistoj kun abonkosto egala al ĉ 6,50 guldenoj inkluzive afrankadon.

Ĉu via Pedagogia Sekcio povus okaze helpi en la redaktado de la lanĉota (1972) revuo? Ĉu vi povus aktive partopreni en la agado varbi la indikitajn 250 ekzemplerojn ĉe via Landa Asocio.

## Pri Internacia Legolibro

Helmut Sonnabend, Germanio Vicprezidanto de ILEI.

Mi ĉiam havas la zorgon, ke Esperanto povus nur resti sur la nivelo de nacia propra-kulturo. Tiel ni posedus francan, anglan, bulgaran, hungaran, germanan, polan, danan, svedan, nederlandan, grekan, ktp. „Esperantojn“, sed ne la internacian. Ni ofte parolas pri tio, ke Esperanto devus esti la ponto al naciaj kulturoj. Nur ŝajnas al mi, ke ni ĝis nun nur konstruis ponteton, aŭ en niaj manoj ni nur portas la partojn de giganta ponto ankoraŭ konstruota. Do, ni internaciigu nian esperantan instruadon, ĉar nur tiel la Internacia Lingvo troviĝas en sia elemento, aliflanke ĝi nur malsanetas en la krepusko de superkreskanta nacia kulturo.

Mi estas plene konscia pri la malfacilaĵoj krei tian legolibron ĉar ĝi devos esti verkataj lau diversaj vidpunktoj (aĝoj de la infanoj, la lingvaj konoj, ktp.). Unue ni kolektu ĉiujn eblajn legaĵojn kaj literaturaĵojn, poste ni esploru la tutan materialon laŭ diversaj kvalitoj. Sekvos la ordigado kaj enordigado ĝis finfine ni estos akiritaj la strukturon de niaj legolibroj.

Malgrandan stokon da legaĵoj mi jam posedas, liveritan de francaj gekolegoj, kiuj regule tradukas el sia literaturo. Ankaŭ vin mi nun petas, bonvolu subteni tiun ĉi gravan laboron. Travidu la legolibrojn en viaj lernejoj, kaj se vi legaĵojn opinias bonaj kaj taugaj, bonvolu traduki ilin kaj sendi al mi. La redaktoro de IPR estas preta, funkcii kiel kolektulo.

Neniu hezitu kunlabori, ni ja laboras por niaj infanoj.

## Enketo ĉe geinstruistoj de elementaj lernejoj

Celo: kompari la situacion de la geinstruistoj de diversaj landoj sur la tuta mondo laŭ profesia vidpunkto.

Gekolegoj bonvolu sendi respondon al:

S-ino Humm, lernejestrino, Chemin des 9 Peyres, 84-Avignon

**Lando:** **Urbo:** **Lernejejo:** ĉu publika? ĉu privata? ĉu por knaboj? knabinoj? geknaboj?

Nomo de la lernejo: **Nombro de gelernantoj:** **Aĝo:**

Nombroj de klasoj: **Instrutempo semajna:** **Tempo por korektoj:** por preparoj: **Nombro de lernantoj, kiuj tagmanĝas en la lernejo:** ĉu geinstruistoj ĉeestas la tagmanĝon? **en kiuj kondiĉoj?** devige aŭ ne — page aŭ senpage? ĉu la gelernantoj kutime restas en la lernejo — post la instrutempo? **Kiom da?**

**Ĉu geinstruistoj prizorgas tiun plian okupon?** en kiuj kondiĉoj?

**Ĉu en via lernejo geinstruistoj respondecas pri apartaj fakoj? (klubo, sportoj, muziko, esperanto . . . ktp.)** en kiuj kondiĉoj? **Kiom da semajnoj vi libertempas jare?** Ĉu la lernejestro (ino) instruas? **Kiom da horoj li — ŝi instruas?** . . . li — ŝi dediĉas al estrado? **Kiun plian salajron li — ŝi ricevas pro estrado?** **Salajroj:** komencantaj geinstruistoj: **35 jara:** **fine de la kariero:**

**direktoro:** Je kiu aĝo geinstruistoj ĉesigas laŭrajte sian profesion laboron? **Kiun pensionon ili ricevas?**

**Dato:** **Subskribo:**

## La rezulto de fremdlingva instruado

Emilija Lapenna, Jugoslavio

Ĉi tiu skribajo ne estas artikolo, sed propono, laŭ mia opinio, se realigita, bone uzebla. Temas pri materialo pruvefika kiom senutila estas la lernado de fremdaj lingvoj en lernejoj, precipe se la lernejo ne disponas pri modernaj aŭdo-vidaj aparatoj. Tiaj lernejoj ekzistas en Jugoslavio multaj. Dokumenton pri malefiko de studado de fremdaj lingvoj en tiaj lernejoj certe ne liveros al ni instruistoj. Per iom da ruzo ni men povas kolekti tian dokomentaron.

Jen kion mi faris. Al mia servantino mi donis taskon, traduki al la germana 10 simplajn frazojn. Ŝi lernis la germana lingvon en unu vilaĝa lernejo sep jarojn. Kompreneble mi prisilentis, ke pro la kontrolo de ŝia scio mi donis al ŝi tiun taskon. Mi iel elturniĝis. La frazoj estis tiaj:

Mia nomo estas . . . Mi naskiĝis en la vilaĝo . . .  
Mi finis okklasan elementan lernejon en la loko . . . Germanan lingvon mi lernis sep jarojn. Kaj ankoraŭ 6 tiajn frazojn.

Tion ŝi tradukis al la germana. La korekton de la tradukaĵo ne faris mi sed la mezlerneja profesoro pri la germana. En dek tradukitaj frazoj estis **kvindeko da eraroj**. La tradukaĵo estas modelo de terura malscio kaj pli ol pruvo kiom vana estis la tempo elspezita por tiu lernado.

Mi mem kolektas daŭre tiajn perlojn. Ĉu ne estus bone disponi pri tiaj pruvoj internaciskale kaj je diversaj niveloj? Mi posedas eraran tradukaĵon faritan de diplomita mezlerneja profesoro pri unu fremda lingvo.

Pedagogoj, sed ne nur ili, povus multe helpi en tia kolektado. La redaktoro de IPR volonte akceptas tian materialon.

## El leteroj

Speciale plaĉis al mi la inspira prelego de la malfeliĉe forpasinta prof. R. Rakuša. Krome multe imponis al mi la bele prezentita, pedagogie elstara „Enkonduko en la Studadon de Esperanto“.

... Tiurilate, permesu min sugesti, ke vi indiku la abonprezon almenaŭ ankaŭ en usonaj dolaroj kaj espereble krome en pundoj, svisaj frankoj, ktp. Prof. d-ro R. Wood, Usono

... mankas la artikoloj, kiuj prezentus ĝenerale la problemojn didaktikajn, edukajn, pedagogiajn, etikajn, moralajn en la nuntempa lernejo. W. Zytyński, Pollando

... mi tamen konsideras nekonvene meti en paĝon 4 preskaŭ tutpaĝan nekrologon por p-ro Rakuša. Same la artikolo de p-ro Rakuša devus ne troviĝi en IPR..., ĉar ĝi nur periferie tuŝetas edukadon. U. J. Moritz, Germanio

## D Dokumentado

### Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj de Pollando

## Instruprogramo de Esperanto

Tiu ĉi instruprogramo estas aprobita de la Ministerio por Klerigo kaj Superaj Lernejoj la 22-an de decembro 1967 /nro PRL-4120-Esp-2/67/.

En la prilaboro de la instruprogramo de Esperanto partoprenis: Andrzej Pettyn (la aŭtoro de la projekto de la instruprogramo), Prof. d-ro Zenon Klemensiewicz, mag. Maria Krausowa, mag. Tyburcjusz Tyblewski, mag. Tadeusz Hodakowski, Włodzimierz Zytyński (recenzintoj).

### Enkonduko

La kono de Esperanto havas grandan signifon en la nuntempa mondo. La nuna evoluo de la internaciaj rilatoj postulas multajn kontaktojn personajn kaj korespondajn, en kiuj oni ĉiam pli ofte utiligas Esperanton.

La instruado de Esperanto akcelas la edukadon de la junularo en la spirito de humanismo kaj internaciismo, pliprofundigas la interesiĝon pri la nuntempa mondo, vekas la ambicion ekregi aliajn fremdajn lingvojn.

La celoj de la instruado de Esperanto kiel nedeviga lernobjekto en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj estas:

- ekrego de la praktika lingvokono parole kaj skribe en la grado ebliganta uzi ĉi tiun lingvon por la aferoj de la ĉiutaga vivo;
- alkitimigo al memstara legado per spertigo de la scipovo profiti la revuojn, beletron kaj popularsciencajn eldonaĵojn;
- preparo al la plua memstara profundigado kaj plivastigado de la lingvokono.

### Instrumaterialo 1a Lernoĵaro

(3 instruhoroj semajne)

#### TEMOJ

#### Parol-, leg- kaj skribekzercoj

Lernejo: la ĉirkaŭaĵo de la lernanto kaj liaj okupoj; lernado kaj amuziĝado.

Hejmo: membroj de la familio kaj iliaj okupoj; loĝejo; teknikaj aranĝoj en la loĝejo (ekz. radioricevilo, televidilo, telefonaparato, lavmaŝino, glaciŝranko, polvosuĉilo); helpo de la junularo en la hejmaj laboroj; persona higieno; dombestoj.

Kalendaro: nomoj de la semajnotagoj, tagpartoj; nomoj de la monatoj; jarsezonoj; difinado de datoj; vetero, horloĝo, difinado de tempo.

Varsovio — la ĉefurbo de Pollando (stratoj, placoj, parkoj, trafikiloj).

Versaĵoj kaj kantoj.

## VORTPROVIZO

Vortoj kaj esprimoj ligitaj kun la parol-, leg-, kaj skribekzercoj kun precipa konsidero al la vortprovizo el la vivo de lernanto en lernejo kaj hejmo (ĉirkaŭ 600 vortoj).

## GRAMATIKA MATERIALO

### Sonoj kaj literoj

La sonoj kaj respondaj al ili literoj en Esperanto. La elparolo de la sonoj kun precipa konsidero al „i“ post konsonanto, antaŭ vokalo kaj post vokalo. Literoj kun supersignoj. Akcento.

### Morfologio

La uzado de la artikolo „la“ (la fundamentaj kazoj de la uzado).

Nominativo de substantivo en singularo kun la finaĵo „-o“; plivastigo de tiu ĉi formo en pluralo je la finaĵo „-j“. Substantivo kun la prepozicio „de“, kun la prepozicio „al“, akuzativo kun la finaĵo „-n“. Kunligo de substantivo kun aliaj prepozicioj. Vokativo.

Adjektivo en nominativo (singularo kun la finaĵo „-a“); plivastigo de tiu ĉi formo en pluralo je la finaĵo „-j“ kaj kunligo de ambaŭ formoj kun la finaĵo „-n“ en akuzativo. Adjektivo kaj la problemoj de gramatikaj genroj.

Infinitivo kun la finaĵo „-i“. Prezenco kun la finaĵo „-as“, preterito kun la finaĵo „-is“, futuro kun la finaĵo „os“, kondicionalo kun la finaĵo „us“ kaj volitivo kun la finaĵo „-u“. La rolo de substantivo kaj pronomo en la difinado de la persono de verbo. La nepersona formo de verboj (oni).

Nominativo de personpronomoj: mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili; la pronomo „si“ (la finaĵo „-n“ en akuzativo). Aliaj kazoj en kunligo kun prepozicioj.

Nedifinaj pronomoj: iu/j/, io.

Demandaj kaj rilatoj pronomoj: kiu/j, tiu/j, ĉi, tio, tio, ĉi.

Posedpronomoj.

Pluralo de pronomadjektivoj.

La tabel-adverboj:

— nedifinaj: ie, ien, iam, ial, iel,

Demandaj kaj rilatoj pronomoj: kiu/j, tiu/j, ĉi, tio, tio ĉi.

— montraj: tio/ĉi/, tia/ĉi/, tiam, tial, tiel/ĉi/.

La literaj vortfaraj elementoj: k- /demandaj kaj rilataj pronomoj/, t- /montraj pronomoj/.

La bazaj numeraloj /simplaj kaj kompleksaj/; la vicmontraj numeraloj.

Pronomnumeraloj: iom, kiom, tiom.

Adverbaj numeraloj: (kun la finaĵo „-e“)

Frakciigo (kun la sufikso „-on“).

Derivitaj adverboj kun la finaĵo „-e“. Primitivaj adverboj („hodiaŭ“, „tre“, „nun“ ktp).

Plej ofte uzataj prepozicioj: de, al, sur, sub, kun, el, por, ĉe, apud, antaŭ, malantaŭ, per, pri, pro.

Plej ofte uzataj konjunkcioj: kaj, aŭ, sed, se, kvankam, ĉar, por.

Neado kun la uzo de la adverbo „ne“.

Vortfarado — la principio derivi per la finaĵoj: -o, -a, -e, -i.

Parencaj vortoj; vortradikoj kaj vortderivaĵoj.

Prefiksoj: mal-, ge-, re-; sufiksoj: -aĵ, -il, -in, -ist, -ej, uj (landnomo; vazo aŭ simil-forma objekto), io, -lando, -ul, -nj, -ĉj.

Komparacio de adjektivoj kaj adverboj per: pli, malpli, plej, malplej. Tiel . . . kiel, pli . . . ol . . ., plej . . . el . . ., plej . . . en . . ., ktp.

**Sintakso**

Strukturo kaj vortordo de propozicioj simplaj: indikaj, demandaj, neaj kaj ordonaj. La partiklo „ĉu?“ en demandaj propozicioj. Predikativo subjekta rekta /formo nominativa/.

**2a Lernoĵaro**

TEMOJ

(2 instruhoroj semajne)

**Parol-, leg-, kaj skribekzercoj**

Scenoj el la vivo de lernanto en lernejo kaj hejmo (kun precipa konsidero al amikeco kaj kolegeca helpo, observado al disciplino, sistemeco en la laboro, respekto al la socia havaĵo). Rememoroj pri la somera feriado (ekz. pri tendaroj, ekskursoj al la plej interesaj kaj pitoreskaj lokoj de la lando).

Sporto, kulturaj distroj (kino, teatro).

Scenoj el la vivo en urbo. Strattrafiko, observado al reguloj de vojtrafiko; veturo per aŭtobuso, trolebuso kaj tramo en granda urbo. Aĉetoj en vendejoj, kioskoj ktp.; koloroj, mezuroj, mezuriloj, materialoj, mono.

Scenoj el la vivo en vilaĝo en la diversaj jarsezonoj.

Versaĵoj, kantoj, proverboj, anektdoj.

Skribado de leteroj.

**VORTPROVIZO**

Ripeto kaj plivastigo de la ellernita vortprovizo je novaj vortoj kaj parolturnoj ligitaj kun parol-, leg- kaj skribekzercoj kun precipa konsidero al vortprovizo el la vivo de urbo kaj kamparo (ĉirkaŭ 300—400 novaj vortoj). Vortoj komunradikaj en Esperanto kaj en la pola lingvo.

**GRAMATIKA MATERIALO**

Ripeto kaj plifirmigo de la scioj de la unua lernoĵaro.

**Morfologio**

La uzado de la akcesora formo de la artikolo „l“.

Sumigpronomoj kun la elemento „ĉ-“ en la vortkomenco: ĉiu, ĉio, ĉie, ĉien, ĉiam, ĉiel, ĉial; neaj pronomoj kun la elemento „nen“: neniu, nenio, nenie, nenien, neniam, neniel, nenial; pronomnumeralo: ĉiom.

Aktivaj participoj kun la sufikso „-ant“, pasivaj participoj kun la sufiksoj „-at“ kaj „-it“.

Pasivo.

Kompleksaj prepozicioj: ekde, de post.

Vortfarado — la prefikso „ek-“; la sufiksoj: -ig, -iĝ, -ad, -ec, -em, -ebl, -eg, -et, -op.

Kunmetitaj vortoj. Akcento de kunmetitaj vortoj.

**Sintakso**

La kompleksaj propozicioj subordigitaj kaj kunordigitaj. Korekta vortordo en kompleksaj propozicioj.

**3a Lernoĵaro**

TEMOJ

(2 instruhoroj semajne)

**Parol-, leg- kaj skribekzercoj**

Scenoj el la vivo de gelernantoj en Pollando kaj en aliaj landoj (en kaj ekster lernejo). Vojaĝo per trajno, aviadilo, ŝipo; sendado de poŝt-kartoj, leteroj, telegramoj, pakajoj, mono.

Scenoj el la vivo de la homoj en Pollando kaj en aliaj landoj, en urboj kaj vilaĝoj; iliaj okupoj kaj laboro en industria entrepreno, komerco, agrokulturo ktp. Kelkaj teknikaj aranĝoj kaj laborspecoj; evoluo de tekniko.

Versaĵoj, anektdoj, proverboj, sentencoj. Legado de facilaj tekstoj.

## VORTPROVIZO

Ripeto kaj plivastigo de la ellernita vortprovizo je pluaj novaj vortoj kaj parolturnoj ligitaj kun parol-, leg-kaj skribekzercoj kun precipa konsidero al la vortoj bildigantaj la vivon de la homoj en Pollando kaj en aliaj landoj, iliajn okupojn en industrio, trafik-servoj, komerco, agrokulturo; vortoj el tekniko, i. a. la fundamenta terminaro ligita kun la konkerado de la kosmo; vortoj esprimantaj sentostatojn; kontenton, ĝojon, plezuron, ĉagrenon, bedaŭron ktp. (ĉirkaŭ 300—400 novaj vortoj). Kunmetitaj vortoj.

## GRAMATIKA MATERIALO

Ripeto, profundigo kaj plifirmigo de la scioj el la unua kaj dua lernojaroj.

### Morfologio

Aktiva participo kun la sufiksoj „-int“, „ont“, pasiva participo kun la sufikso „-ot“; la formoj: „-inte“, kaj „-onte“. La uzado de participoj por formado de kunmetitaj tempoj kun la helpverbo „esti“.

Vortfarado — prefiksoj: dis-, fi-, mis-, pra-, eks-; sufiksoj: -an, -uj (nomo de arbo aŭ arbusto), -ind, -end, -ism, -um, -id, -aĉ.

Prepozicioj kaj adverboj en la funkcio de prefiksoj.

### Sintakso

La uzado de participoj en la funkcio de diversaj frazpartoj kaj subpropozicioj senverabaj.

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de la  
Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)  
Jarkolekto 2, n-ro 1  
Aperas trifoje po jare

Abonprezo 6,— GM, unuopa kajero 3,— GM

Redaktoro: Helmut Sonnabend, rektoro

Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, Germanujo

Eldonejo: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2, Germanujo  
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56

Bankkontoj: Stadtparkasse Nürnberg 90 157

Bayerische Vereinsbank Nürnberg 5 606 489

Aŭstra bankkonto: Österreichische Länderbank Bregenz 8 891 611

Svisa bankkonto: Schweizerische Volksbank St. Gallen 629 240

La abonprezon oni pagu al la eldonejo

---

Tarifo por anoncoj:

1 paĝo	250,— GM	1/2 paĝo	125,— GM
1/4 paĝo	80,— GM	1/8 paĝo	40,— GM

Anoncetoj —,25 GM po vorto

## Ĉu vi deziras gajni 10-tagan ekskurson tra Pollando?

Partoprenu la novan konkurson de la Pola Radio

# „FORUMO - EŬROPO - 71”

La respondo al ambaŭ subaj demandoj ebligas lotum-gajni unu el la ĉefaj premioj — 10-tagan senpagan ekskurson tra Pollando:

1. Kiel vi rilatas al la propono de la socialismaj landoj kunvoki konferencon pri la afero de la eŭropa sekureco kaj kunlaboro, kaj kion vi atendas de tiu ĉi konferenco?
2. Kiuj personoj en via lando kaj en kia maniero speciale meritiĝis por la afero de la paco?

Inter la partoprenontoj de la konkurso, krom la ĉefpremioj, estos lotumitaj multaj objektaĵaj premioj kaj memordonacoj.

La leteroj kun respondoj oni sendu al: **Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio - 1, P.O.Box - 46; Pollando**, en kovertoj signitaj per la devizo: „Forumo” — ĝis la 31-a de decembro 1971 /decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 31-an de januaro 1972 en la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio, kiuj estas aŭdigataj ĉiutage je la 6.00 h. / ondolongoj — meza: 200 m., mallongaj: 41 m., 49 m / kaj je la 16.30 h. / mallongaj ondolongoj: 31 m., 41 m. /. Ambaŭ elsendo-horoj estas indikitaj laŭ mezeŭropa tempo.

Invitante al la partopreno en la konkurso ni samtempe petas diskonigi ĝin vaste inter viaj konatoj, samklubanoj, leter-amikoj. Ni firme kredas, ke en la konkurso, kies temoj kongruas kun la pacaj idealoj de la E-movado, la esperantistoj partoprenos amase.

Bonŝancon en la lotado de la premioj!

POLA RADIO